

Boletín

de la Federación Española de Esperanto



"BOLETIN" BULTENO DE HISPANA ESPERANTO - FEDERACIO

Centra Oficejo: c/Rodriguez de San Pedro, 13.-3º.-P-7. 28015 MADRID.-

Prezidanto:

Antonio Alonso Núñez

Apartado 714

E-15780-SANTIAGO DE COMPOSTELA.

Sekretario:

Manuel López Hernández

Apartado 369

E-41080-SEVILLA (Hispanio)

Vicprezidanto:

Alberto Franco Ramirez

Vicsekretario:

Luis Gil Pérez

Estrarano pri Kontado.

Kasisto:

José M^a Bernabeu Franco

Gral. Primo Rivera, 6

03360-Callosa de Segura

(Alicante) Hispanio.

Pagojn sendu al tiu nomo en

Banco Español de Crédito

Konto n^o 138. 150507.9.

03360-Callosa de Segura.

Libro-Servo de HEF:

Luis Hernández Garcia

Apartado 119

47080-VALLADOLID.(Hispanio)

"Fundacio Esperanto de HEF"

Sekretariino: Inés Gastón

P^a de la Constitución, 35.4^o

50001-ZARAGOZA (Hispanio)

Junulara Sekcio (HEJS)

Prezidanto: Iñaki GAUNA

Domingo Beltran, 42.-4^o.D.

01012-GASTEIZ-VITORIA

Ĉef-Redaktoro:

Antonio Marco Botella

Av. Compromiso de Caspe, 27/29.9^o.C.

E-50002 ZARAGOZA (Hispanio)

Redaktoroj kaj kunlaborantoj:

Salvador Gumá Clavell

Miguel Fernández Martín

Vicente Hernández Llusera

Andrés Martín González

Luis Serrano Pérez

Miguel Gutierrez Aduriz

Enhavo:

Nia Orjubilea kongreso . . . 3/4.pĝ

Kaj la kongreso okazis . . . 5,"

Unua kongrestago 6,"

Dua kongrestago 7/8,"

Tria kongrestago 9/10,"

Kvara kongrestago 11 al 14,"

Kvina kongrestago 15 al 19,"

Sesa kaj lasta kongrestago . . . 20,"

Profitu por Esperanto! . . . 21,"

Viglas la Movado 22/23,"

Gazalo pri la obskura morto 24,"

Samuel ibn Nagrella, poeto, 25,"

Kovrilo: La prezidantaro en la omaĝo al la forpasintoj, pĝ.16/17.

NOTO.- Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Nia orjubilea kongreso


Se oni devus difini per nur kelkaj vortoj la signifon de nia Ora Jubilea Kongreso en Sant Cugat, oni povus diri, ke ĝi estis la kongreso de la rekomenco, kio absolute ne signifas perdi la perspektivon de nia pasinteco, forgesi niajn spertojn aŭ malestimi la laboron faritan de niaj antaŭuloj laŭdaŭre de nia ekzisto. Ĉiu horo havas sian signifon. Ĉiu situacio postulas sian decidon.

Inteligenta pragmata politikisto, eble unu el la plej elstaraj en la mondo dum la unua duono de tiu ĉi jarcento, trafe asertis en certa kriza okazo, ke "kiam la konfuzeco ne lasas nin percepti la realon, la vojo trairota ne aperas klare antaŭ ni, aŭ ke la ŝanĝiĝoj en nia ĉirkaŭo stompas la profilojn de nia idealo, estas konsilinde nepre rekomenci, reveni al la principoj, reserĉi en la esenco de nia idearo la forton necesan por ekpaŝi denove al nia estonteco"...

Mi plene konsentas pri tio, kaj opinias oportuna la reagon de la hispanaj esperantistoj en Sant Cugat, kiuj per sia sinteno montris, ke ili decidis komenci novan etapon.

Efektive, la esperantistoj de la hispanaj landoj, ne povas, nek rajtas ignori la ŝanĝiĝojn en nia socio de kiam oni fondis HEF en 1947a. Tiuj konstantaj ŝanĝiĝoj, tiu nebremsebla socia evoluo ampleksanta de la socia kaj

politika libereco ĝis la tuta agnosko de la homaj rajtoj, plene modifis la vivadmanieron de la hispanoj, malfreŝigis la Statuton de HEF, niajn instrusistemojn, nian kutiman propagandon kaj resume nian esperantistan pozicion antaŭ la socio. Ne estas simpla hazardo, ke kelkaj gravaj esperantistaj Grupoj ĉe ni ŝajnis lastatempe paralizitaj, iel nekapablaj reakiri la impulson necesan por antaŭeniri. Estas evidente, ke ni bezonis kaj bezonas modernigi nin,



alpasi la ritmon de la Federacio al tiu de la aktualeco, elpensi validajn instrumentojn por sukcesigi nian mesaĝon, ne nur lingvan sed ankaŭ humanan...


Sajnas kohere kaj logike, ke antaŭ tiu panoramo kaj kun nova estraro, la hispanaj esperantistoj komencis en la kongreso de Sant Cugat la gravan taskon renovigi nian strukturon, revizii la Statuton, studi novajn sistemojn por efikigi niajn Grupojn kaj stabiligi ilin ekonomie por la propra malvolviĝo, kaj resume, aktualigi nin kontraŭ la defioj de la nuna tempo. La tasko ne estas ja unutaga, sed bona decido estas, ke oni jam komencis ĝin.

Al tiuj internaj ŝanĝiĝoj de la hispana socio dum preskaŭ duona jarcento, aldoniĝas nun alia sufiĉe grava: subite disfalis la Berlina murego simbolanta la dividon de la mondo en du partojn. Falis ferkurtenoj kaj reĝimoj. Teruraj nukleaj armiloj kaj aliaj ne malpli danĝeraj restis, feliĉe, sencelaj. Simpliĝis multenombraj problemoj pri interrilatado de homoj kaj popoloj. Liliputiĝis ankoraŭ pli la distancoj kaj neniam kiel nun estis pli konstateble, ke kio okazas al niaj najbaroj koncernas ankaŭ nin. La romantikaj amikecaj rilatoj inter esperantistoj ne plu sufiĉas: urĝe oni bezonas starigi komunan politikon inter landaj esperantistaj asocioj de la Eŭropa Merkato, de la tuta Eŭropo, de ĉiu kontinento. Oni bezonas pli pragmatan "agreseman" politikon de UEA, SAT kaj ceteraj universalaj asocioj, ne kiel pasivaj sekvantaroj, sed kiel efektiva premforto...

Nia Ora Jubilea Kongreso estis ja la rekomenco por alĝustigi nian celon al la horloĝo de la nuna tempo. Ankaŭ nun estas la ĝusta horo elpensi efikan komunan programon kaj agadon kun aliaj landoj, paralelan je tiuj kiujn ni rekomencis. Iam, ni esperu ke post ne longe, ambaŭ politikoj kunfandiĝos en unu solan, ĉar estos jam veninta la tago kiam "la homoj faros en konsento unu grandan rondon familiaĵ".

La Redakcio.

...kaj la kongreso okazis



La 50a Hispana Esperanta Kongreso jam apartenas al la historio. Ĝi okazis en Sant Cugat del Vallés, urbo tute proksima al Barcelono, kie antaŭ 70 jaroj fariĝis realo tiu unua memorinda kongreso de la hispanaj esperantistoj, tiel multe revata de niaj pioniroj!. La mondo tute ŝanĝiĝis post tiuj malproksimaj tagoj, sed kio reale restis neŝanĝita, tio estis la bezono de ĉiu homo kaj popolo je internacia lingvo, kiu faciligu la homajn rilatojn inter ili, kaj paralele disvastigu la interkompreniĝon kaj pacisman idealon. Kaj ĝis ni atingos la celon ni plu laboros, kaj kongresos, kaj strebos...

Unua kongrestago

Oni devas publike gratuli la O.K.K.-on kiu senlace laboris kaj ebligis la pozitivan finan rezulton. La taŭgeco de la ejo faciligis la kunvivadon de la rondo dum la tagoj kiam okazis la evento: de la 11a ĝis la 16a de Julio 1990^a.

Antaŭ ol tuŝi la ĉiutagan malvolviĝon de la ĉi-jara bunta programo, konvenas reliefigi la intereson, kiun en Katalunio provokis nia kongreso inter la amas-komunikiloj. Jam frue okazis intervjuo far TVE, 2 al la HEF-estraro, al pluraj LKK-anoj kaj al niaj artistoj, kiu pruviĝis, laŭ multaj opinioj, la plej bona ĝis nun farita rilate Esperanton. Ankaŭ pluraj katalunaj ĵurnaloj informis abunde kaj detale pri nia kongreso.

La unua kongrestago estis tre densa kaj peza por la OKK kaj HEF-estraro, pro la abundo da preparlaboroj. Inverse, por la ĵus alvenintaj kongresanoj estis la belaj horoj de la renkontiĝo, de amikoj, de samideanoj, de simplaj konatoj: la rezulto post almenaŭ unu jaro. Fakte unu el la momentoj plej arde dezirataj kaj kutime plaĉe travivataj de la kongresanoj.

Unu el la problemoj pli frue studataj de la HEF-estraro temis pri la junularo: Nia Federacio konscias, ke nia plej granda kapitalo troviĝas en niaj junaj fortoj, (kelkaj el ili jam apartenas al la HEF-estraro), kaj tial ĝi volas nenion trudi al ili, ĉar certe ili ja rajtas organiziĝi laŭ sia bontrovo. Nur pri unu punkto la HEF-estraro estas konvinkita kaj pri tio petas de sia junularo respondon, aŭ sugeston, aŭ



konsilon: ne nur HEF sed ankaŭ la institucioj de la "ekstera" mondo devas mem konstati ke ekzistas junaj fortoj inter la uzantoj de Esperanto. Nu, kiu estu la maniero, vojo, rimedo por tion atingi? Tiu devas esti decido de la junuloj mem; dume pro manko da kvorumo oni ne povis voĉdoni

kaj oni venis al jena oficiala konsento, inter HEF, la ĝisnuna HEJS-prezidanto Jordi Ferré kaj Iñaki Gauna, prezidanto de Euska Esperanto Asocio: Ferré ĉesas en la prezida posteno; Iñaki fariĝas la nova prezidanto, kun plena agorajto por reorganizi niajn junajn fortojn laŭ ilia propra decido. En la venonta kongreso li informos pri demarŝoj faritaj. Intertempe, li povas plenrajte munti estraron por la junulaj aferoj.

Dua kongrestago. La inauguro

La nova taktiko aŭspiciata de la Prezidanto Alonso antaŭ la Administracio, kaj la partopreno de TV-1 kaj ĵurnalistoj en la inauguro de la kongreso rezultigis certan novigan etoson iel ŝangantan la iaman rutinan programeron per mesaĝo pli utila kaj kohera kun niaj celoj, ĉar oni

bone konjektis, ke la Prezidanto volas kapti la okazon por publike proklami sian taktikon.

Prezidis S-ro Alonso, la urbestro de Sant Cugat S-ro Aymerich, la Prezidantino de OKK kaj junaj estraranoj, per kiuj oni intencis speguli certan bildon pri rejuniĝo.

La Prezidanto, unue, salutis la ĉeestantaron en la kataluna, kastilia kaj esperanta lingvoj. Tuj, kun firma voĉo kaj elokvente diris:

"Ĉi-jare ni atingas nian 50an, sekve jubilean kongreson. Neniu pli taŭga loko por tia jubileo ol la kataluna lando, iama pioniro kaj ĉiam avangardo de nia kultura kaj socie grava movado. Tial, estas por mi persone kaj por la tuta

Hispana Esperanto-Federacio agrabla devo esprimi nian dankon kaj admiron al tiu pionira kaj avangarda rolo, kiu cetere ja estas plia trajto de la tre altnivela socia kaj kultura etoso reganta en la kataluna popolo".

"Tial, en la kadro de nia jubilea kongreso ni omaĝos la memoron de ĉiuj antaŭaj katalunaj esperantistoj, kaj en seninterrompa fadeno ni festos ĉe la plej bela kaj moderna monumento al Zamenhof, troviĝanta en la kataluna urbo Sabadell, ĝuste en tiu sama strato, kiu unua en la mondo jam en la jaro 1912a estis dediĉita al la elpensinto de Esperanto".

(Jam nur en Esperanto): "Ni kun ĝojo konstatas, ke niaj vicoj riĉiĝas per novaj fortoj, por nia Movado plej gravaj. Ni devas kutimiĝi al la fakto, ke ju pli multnombraj ni fariĝos, des pli variaj estos la projektoj kaj celoj de la diversaj uzantoj kaj asocioj de Esperanto: jen iuj sin tenadas nur al la baza celo (kiel eble plej amplekse disvastigi kaj uzadi Esperanton), jen aliaj defendas ankaŭ pli specifajn celojn (politikajn, junularajn, religiajn, literaturajn, sportajn, instruajn, ktp.)"

"Kutimiĝinte al tia bunta kaj riĉiga varieco, ni konscias, ke kunlaborado inter ĉiuj tiaj tendencoj ja estos necesa kaj profitodona; kaj ke kunlaborado povas baziĝi nur sur reciproka respekto unuflanke, kaj per atentado al nia baza celo antaŭe citita, kio estas la sola komuna ligilo inter ni -kio, krome, estas la sola fundamenta ekzistokialo de niaj asocioj-. Tia kunlaborado postulos ioman reciprokajn cedon, sed ĉar mi estas konvinkita ke tia ioma cedo povas okazi sen malprofito al ĉies unuopa baza sinteno, mi certas ke ni finfine povos efike kunlabori en unueco. Kaj al unueco inter ĉiuj hispanaj esperantistaj fortoj mi alvokas en tiu ĉi inaŭguro".

"Ni ĵus parolis pri afero kiu rilatas al la internaj vivo kaj funkciado de la hispana E-movado. Mi min turnas nun al la tuta socio kaj ĝiaj institucioj -tie ĉi reprezentataj de la Urbestra moŝto de Sant Cugat del Vallés kaj ankaŭ de ĉiuj membroj de la Honora Komitato de nia Kongreso, kies nomoj aperas en la Kongreslibro. Kaj mi petas la reprezentantojn de la sociaj komunikiloj, ke pri ĉi tiu punkto ili speciale informu la socion: "Estus longa eĉ nura skizo pri ĉiuj agadoj nuntempe ekzistantaj pri E.kaj

per E. Mi tial turnas vian atenton nur al jena punkto: en la Esperanta Movado ekzistas konsiderinda homa kaj kultura kapitalo, kiu jam de unu jarcento kaj ĉiam pli intense laboradas je la servo kaj por la bono de la socio. Estus do juste, ke la socio, per siaj institucioj, pagu tiujn servojn; sed se provizore, ankoraŭ ne la servantojn". "Nu, ni, uzantoj de Esperanto, devas ankaŭ kompreni, ke ni ne rajtus nin turni al la responsuloj de la komuna bono kaj de la publika mono, por peti de ili ian ĝeneralan kaj abstraktan apogon al niaj celoj. Tute alie, nia devo estas prezenti al ili bone strukturitajn projektojn, kun indiko pri celo, rimedoj bezonataj, kalendaro, buĝeto, ktp.; ankaŭ kun indiko pri jam ekzistantaj oficialaj kaj mecenataj programoj kaj planoj, en kiujn niaj projektoj povas esti akceptitaj (ni citu, ekzemple, la programojn LINGUA kaj ERASMUS de la Eŭropa Komunumo)".

"Ne estas tie ĉi la loko detali pri tiaj projektoj tra la tuta mondo (por ekzemplo, la Akademio Internacia de la Sciencoj en San Marino; la Internacia Universitato, per Esperanto nun planata en Beĵing, ktp.) Sed ja estas loko kaj oportuna momento por informi, ke nuntempe en Hispanio ni jam malvolvis projektojn pri televida kurso pri Esperanto kaj pri periodaj Internaciaj Preuniversitataj Somerkursoj en Esperanto. Ni havas tiujn planojn je dispono de niaj institucioj, kaj baldaŭ ni oficiale plu informos pri ili".

"Jen, do, du konkretaj planoj (televida kurso pri E., Internaciaj kursoj en E.), kiuj atendas la plenumiĝon cititan: la uzantaro de E. provizos la homan kaj kulturan kapitalon bezonatan, kaj niaj institucioj provizu la bezonatajn financajn kaj teknikajn rimedojn, ili ankaŭ kontrolu la tutan evoluon de la projektoj, ktp. Ni tion petas, kaj ni esperas ke ĉio venos al baldaŭa realiĝo".

Varma aplaŭdado premiis la paroladon de la Prezidanto. Samtempa tradukado por la Urbestro kaj resumo skribita por la ĵurnalistoj estis faritaj. Mallongaj paroladoj de la Urbestro kaj de la Prezidantino de OKK kompletigis la akton de la solena Inaŭguro. Poste, kaj tute neeksplikeble, venis longa vico de salutoj de reprezentantoj de Asocioj kaj Grupoj, kutimo jam forigita en antaŭaj kongresoj ĉar montriĝas teda, kaduka kaj neutila. Eble tio validas por interna aranĝo sed neniel por publika propagando.

Posttagmeze, ekskurso al Sabadell kun vizito al la Muzeo de la Instituto pri Paleontologio "D-ro M.Crusafont", kie oni povis vidi la plej riĉan kolekton da fosiliaj mamuloj ekzistantaj en nia lando; fakte ĝi estas unu el la plej gravaj en la tuta mondo kaj speciale rimarkindaj. Oni devas citi: skeleton de "myotagus balearicus" el kvaternaro, mandiblon de mastodonto el mioceno, kranio de rinocero miocena, ktp. La vizito estis ja interesa!

De la Muzeo oni iris ĝis la monumento al D-ro Zamenhof, kie nia Prezidanto A.Alonso Núñez ricevis la ŝildon de la urbo Sabadell. Li respondis al tiu honoro per paroladeto emfazanta la simbolan signifon de la monumento, kiu per la figuro de Zamenhof reprezentas ĉiujn veterajn kaj nuntempajn esperantistojn de Sabadell.

Ankoraŭ je la deka vespere okazis prelego kun lumbildoj, de S-ro Frank Buckley: "Sesdek jaroj da esperantista vivo", interesa kolekto de anekdotoj kaj viveroj de simpatia homo, kiu estis tre aplaŭdita.

Tria kongrestago. Ekskursoj



Tuttaga ekskurso al la monaĥejo de Poblet kaj al la Hispana Esperanto-Muzeo de Sant Pau d' Ordal. La unua, admirinda historia monumento, pri kiu ni jam komentis en pasinta numero de "Boletín". La Esperanto-Muzeo, vizitinda hejmo de ĉiu hispana esperantisto, inda loko por studadi nian Movadon.

Post la vespermanĝo, je la deka nokte, gitara koncerto fare de Joan Ráfols, juna koncertisto jam pli ol promeso. La programo konsistis el pluraj pecoj, kies varieco prezentis la okazon al la koncertisto pruvi sian lertecon kiel virtuozo de la gitaro: en la "Variacioj pri temo de Händel", S-ro Rafols, laŭ la partituro, brodis la "ornamojn" de la Variacioj kun evidenta majstreco. Tuj poste, en la "Kanto kaj danco" de Pipo kaj en ambaŭ verkoj de Villalobos,


li anstataŭis la teknikon de la unua peco kaj sin lasis luli en la belsona kaj populara ĉarmo de ĉi tiuj komponistoj. La programo estis talente envicigita, ĉar post la ĉiam pitoreska Villalobos oni povis ĝui la kontraston en la muziko de Sors kaj precipe tiu de Yuquiro Yocoh, plenaj

de delikataj nuancoj elvokantaj orientajn resonojn. La "Hungara Fantazio" metis finan punkton al tiu bela koncerto, kiu lasis al ni agrablan impreson pri la bezono plioftigi ĉi tiujn aranĝojn en venontaj kongresoj.

Gratulon al la eminenta artisto S-ro Ráfols! Gratulon al la organizantoj!

Kaj post la koncerto, S-ro Alonso Núñez, en la kadro de ASKH malvolvis interesan Seminarion pri "La Esperanta Konjugacio". Al ĝi nur venis unu disertaĵo. Ĝia iom esotera titolo estas "Provo formaligi la semantikon de ĉiuj verbaj esprimoj rolantaj en la verko Fundamento de Esperanto, (FE)".

La redaktanto de tiu ĉi kroniko sugestis al la aŭtoro de la disertaĵo, ke li mem redaktu noton pri ĝi. Ĉar vera resumo estus tro longa, S-ro Alonso prezentas tie ĉi nuran skizon pri la maniero malvolvi unu el la temoj tie traktitaj. Jen ĝi:



La sago montras al la tempo-fluo. La kvin vizaĝoj montras al parolanto(j), en kvin sinsekvaj momentoj. Litero A montras al la ago "laĉi ŝuon" (t.e. al difinita manipulado de ŝu-ŝnuro fare de iu ajn). La numeroj 1 kaj 2 neniel montras al la dirita ago, sed ja nur al la agulo(homo) kaj al ricevulo de la ago (ŝuo).

Tial, parolante pri la ago A, la parolanto povas principe eldiri, laŭ la koncernaj cirkonstancoj, esprimojn kiel "la homo laĉos/laĉas/laĉis/laĉus/laĉadis/eklaĉu/ĝislaĉus...la ŝuon". Sed parolante pri la agulo(1), li principe povas eldiri "laĉota/laĉata/laĉita ŝuo".

T.e.: La participoj, propre, ne estas verboformoj pri la ago, sed adjektivoj pri la statoj, kiuj rilate la agon aperas ĉe la agulo kaj ĉe la ricevulo. (Cio ĉi ja estas fakto konforma al la lingva sento de ĉiuj homoj, kaj pri kiu parolas ĉiuj gramatikoj. Vidu tiucele la anglan, rusan kaj polan gramatikon de F.E., kiuj eksplicite parolas pri tio; vidu ankaŭ la tiean germanan gramatikon, en kiu Zamenhof klare distingas, per miksa-

do de germana kaj latina terminologioj, ke "faris" temas pri "pasinta tempo", sed "farita" pri "pasiva participo perfekta"; ankaŭ, ke ĉiuj kvin gramatikoj de F.E. diras, ke verboformoj ne varias laŭ nombroj, sed tamen la participoj ja havas la kontraston singularo/pluralo, kiel en "farita/faritaj", ankaŭ "faritan/faritajn", ktp.

Nu, kiuj estas la sekvoj semantikaj kaj formalaj de tiu baza fakto? Tiurilate, la disertaĵo elĉerpe ekspluatita la materialon de la "Ekzercaro de F.E." kun eventuala komparo al aliaj lingvoj, ktp.

Paralele al la participoj, kaj laŭ la sama strategio, la disertacio malvolvis kelkajn kvardek aliajn temojn.

La studemuloj pri ĉi tiuj temoj atentis unue, petis klarigojn poste, kaj debatis dum horoj kune kun la gvidanto de la Seminario S-ro Alonso mil kaj unu malsamajn aspektojn de la temo ĝis... la dua kaj duono matene!

Kvara kongrestago. Prelegoj. Kunsidoj

Sendube estis tiu ĉi la plej malfacila tago por la gekongresanoj, precipe pro la denseco de la programo. La kronikoverkanto konfesas sian nekapablon fidele rakontadi ĉion ĉar li ne povis ĉeesti samtempe du koĉcidentantajn programerojn.

Jam frumatene, en la kutima HEF-estrarkunveno, partoprenis reprezentantoj de Portugala E-Asocio (PEA) por trakti kiaj vojoj de kunlaborado eblas inter HEF kaj PEA, inter kiuj oni tuŝis ĉefe la eblecon disponi portugalan paĝon en "Boletín", kaj ankaŭ kie okazos la postkongreso de Mérida en la jaro 1992. Tuj poste kunsidis la membroj de ILEI por pritrakti organizajn temojn kaj samtempe prezenti la modelon de Santiago de Compostela por enkonduki E-on en la t.n. Institutojn pri Lingvoj.

D-rino Lina Gabrielli disertaciis pri Leo Tolstoj. La temo, estas sufiĉe interesa por la historio de Esperanto, kvankam iom tikla. Laŭ la prelegantino, Tolstoj sciis preskaŭ nenion pri Esperanto, verŝajne estis lia Sekretario kiu sufiĉe kompetentis pri nia lingvo, kaj ĝuste estis tiu ĉi, kun kiu ŝi rilatis por ricevi la koncernenan permeson pri traduko kaj eldono de verko de la rusa aŭtoro, same kiel pri aliaj diversaj temoj, tamen, Tolstoj, firme favoris E-on ekde la unua tempo de la apero de nia lingvo..

Bona prelego, atente aŭskultata de la ĉeestantaro.

En la kadro de sama ASKH prelegis ankaŭ samideano Luis Gilpérez pri "Speleologio, la scienco pri esplorado de kavernoj". La juna speleologo Gilpérez, difinis la fundamentojn de tiu scienco sufiĉe lerte, same

kiel la praktikan uzadon de tiuj esploroj, kiun li kvalifikis kiel pasian sciencan sporton. Li, detale, priskribis la elementojn necesajn por praktiki ĝin: kompason por orientiĝo en galerioj kaj deklivoj, mezurbendon por kalkuli la distancojn, bonan lumigilon, kompleksan ekipaĵon konsistantan el adekvataj vestoj, ŝnuroj, enfendiloj, eskaloj, "karabinoj" kaj cent aliaj instrumentoj kongruaj kun la celo de la esplorado, kompreneble kun la necesa komplemento de grandaj scioj pri topografio, geologio, fiziko, ktp.

La efektiva danĝero en la praktikado de tiu sciencia sporto, la beleco trovebla en multaj kavernoj, kaj la allogo pri eblaj sciencaj eltrovoj, donas al la praktikantoj speleologiaj motivojn pli ol sufiĉajn por trovi en tiu riska aktivado la emociojn de unu el la plej belaj sportoj...



Ankaŭ en la kadro de ASKH dum tiu mateno, alia interesa prelego okazis fare de nia portugala samideano Antonio Almeida, helpe de diapozitivoj, pri la temo "La etruska arto".

La disertanto eksplikis sian kriterion pri la plej gravaj karakterizoj de tiu arto, laŭ li, sen ia ajn rilato kun la helena, kvankam ordinare oni opinias, ke la tuta romia arto devenas el la greka. La etruska popolo -diris S-ro Almeida- loĝis en

la itala duoninsulo kaj ĝia kulturo floris antaŭ la fondiĝo de la Romia Imperio, do oni povas aserti ke la etruska arto estis ja aŭtoktona. La menciita arto manifestiĝas speciale grava kaj interesa en la juveloj kaj eburaĵoj trovitaj en luksaj tomboj, ankaŭ rangas kiel tre bonaj la statuoj kaj muraj pentraĵoj esprimantaj bildojn pri ilia ĉiutaga vivo.

Nia portugala samideano estis varme aplaŭdita!

Ankoraŭ en la kadro de ASKH (Artaj Sciencaj kaj Kulturaj Horoj) s-ano Aŭgusto Casquero skizis sian ellaboratan doktoriĝan tezon pri pedagogio en rilato al Esperanto. La laboro celas pruvi la propedeŭtikan valoron de E. kiel vehiklo de faciligo de la lernado de dua lingvo. Cion oni klopodas pruvi per la jena eksperimento: oni disponas du grupojn da gelnantoj de GBE, al la unua el kiuj oni instruas dum du jaroj la anglan lingvon, kaj al la dua grupo Esperanton dum la unua jaro kaj la anglan dum la dua, esperante atingi ambaŭ grupoj la saman nivelon pri la angla je la fino de la eksperimenta periodo, kun la rezulto ke la dua grupo lernis du lingvojn, dum la unua nur unu.

Aldone oni konstatas, dum la instruado de Esperanto al la koncerna grupo da gelnantoj, kiel ili entuziasme reagas pro ĝia facileco kaj

la praktikaj valoroj, kiuj ili trovas en ĝi kaj la ebleco sin esprimi en fremda lingvo preskaŭ de la unua momento kaj povi korespondi mondscale.

Vere interesa estis ja la prelego de s-ano Casquero!

Kaj fine, por kompleti la matenon, parolis S-ro Alonso Núñez rilate la projekton pri "Internaciaj Preuniversitataj Somerkursoj en Esperanto, kaj indikis, ke ĉiu kongresano jam ricevis ekzempleron n^o 1 de la Informilo pri la projekto. (La ceteraj membroj de HEF ankaŭ ĝin ricevos kun la bulteno). Tiu Informilo estas dissendita al ĉiuj asocioj cititaj en ĝi, kaj al ĉiuj plej gravaj pres-agentejoj, ĵurnaloj, radio kaj televidstacioj, ankaŭ al multaj instancoj edukaj, politikaj, mecenataj, k.s. en Hispanio. HEF-estraro esperas, ke ĉiuj niaj anoj kaj legantoj bonvolos atente trastudi la Informilon, tiel ke ĉiuj siavice fariĝu kompetentaj informantoj al konatoj, institucioj, gravuloj, ktp. en plej diversaj landoj. Kvankam por la "Projekto" ĉia financa helpo estos ja tre bonvena, oni bone atentu, ke ĝi baziĝas sur teknika laborado kaj kunlaborado de la uzantoj de Esperanto, tamen tute ne sur mono venanta el tiuj uzantoj mem, sed venanta el la socio, laŭ jena tre grava principo: "ni estas servantoj al la socio, tial, la socio pere de siaj institucioj pagu mem la servojn, eĉ se provizore ankoraŭ ne la servantojn".

Ciu leganto estas insiste petata mem elpensi la manieron, laŭ kiu li/ŝi sin turnu al mecenatoj, instancoj kaj personoj, kiuj povos iel helpi la "Projekton". HEF-estraro opinias, ke estas tre grave ke en la oficiala adreso de la "Projekto", ni ricevu la leterojn pri kiuj aludas la punkto de la Informilo. Nur post ricevo de adekvata kvanto da leteroj ni povos nin turni al niaj oficialaj instancoj kun peto pri plia, pli grava kaj riĉa helpo kaj instituciigo..

Ni povas jam ĝoje anonci, ke la unua studkajero eldonota por la Kursoj estas tiu kun la teksto de la prelego pri Garcia Lorca farita de Miguel Fernández en la kadro de ASKH de la kongreso de Sant Cugat.

Kaj kun tiuj klarigoj de S-ro Alonso finiĝis la longega mateno.

Posttagmeze Eksterordinara Generala Kunsido de HEF por trastudo kaj eventuala aprobo de modifoj en la statuto. Estis aprobitaj laŭ la nova redakto prezentita la artikoloj: 1, 2, 3, 7, 10, 20, 24, 25, 27, 29, 31 kaj du novaj, kies tekstoj aperas en "Boletín" n^o 296, Majo-Junio 1990^a. Pri la neaprobitaj artikoloj, oni komisiis la estraron pristudi ilin detale por posta redakto kaj eventuala aprobo.

Post mallonga paŭzo okazis la Generala kunveno de HEF. Post legado kaj aprobo de la akto de la antaŭa kongreso en Bilbao, kaj de la ĝenerala kaj financa raportoj, oni traktis la ceterajn punktojn de

la tagordo. Estas menciinde, ke la responsuloj de "Libro-Servo" kaj "Boletín" legis siajn respektivajn raportojn el kiuj ni povas eltiri kiel plej gravajn konkludojn: pri la unua sub la respondeco de Luis Hernández, la pozitivan saldon de la Servo; kaj pri la dua, t.e. "Boletín", ĉefredaktata de Antonio Marco, la malaltigon de ĝia kosto (pli-malpli je la duono) la restarigon de la dumonata periodeco kaj la konstaton de certa plibonigo en la aspekto kaj enhavo de nia organo. Ambaŭ estis varme aplaŭdataj.

Oni devas substreki, ke ne aperis kandidatiĝo por la venontjara kongresurbo, sed certiĝis tiu de Mérida por la jaro 1992^a (kun eventuala postkongreso en Lisbono). La Prezidanto proponis muntadon de serioza ambicia buĝeto kaj konstatis la neceson disponi estraranon kompetentan pri kontado, kiu kun la aprobo de la kontorevizoroj ellaboros ĉiujare kompletan bilancon. Rilate la Universalan Kongreson en la proksima 1993^a en Valencio, Augusto Casquero informis pri la preparlaboroj kaj la pozitivaj demarŝoj ĝis nun faritaj de la valencianoj, same kiel pri la malvaraj helpoj ricevitaj. Bremsas la laboron la fakto, ke UEA ankoraŭ ne liveris oficialan respondon, eĉ se temus pri nur provizora aŭ principa akcepto; ŝajne tiu letero ne venos ĝis 1991^a, kio kaŭzis proteston nian: ni ja estas plene konsciaj ke du jaroj estas ne sufiĉa tempo por adekvate prepari la kongreson. La Prezidanto informis, ke la dosiero pri publika utileco de HEF, jam fakte elfarita, ni tuj ĝin prezentos al la registaro pere de samideano Juan Carlos Ruiz. Kaj en tiu punkto finiĝis la ordinara kunveno de HEF.



Post la vespermanĝo, en la granda salono okazis popmuzika koncerto fare de hispana samideano, kiu profesie ludas muzikon kaj kantas en Esperanto. Eduardo Vargas, malagano, kiun oni jam konas en niaj medioj per la kromnomo "SOLO". Li faras specialan muzikon, kiun oni ne povas difini, ĉar en ĝi miksiĝas elementoj de la folkloro de pluraj kulturoj kun tiuj de la nuntempa moderna muziko. La rezulto estas alloga, precipe por junaj homoj, kiuj interalie ŝatis lian magian prezentadon. Fervore oni aplaŭdis lin. Por fermi la tagon kaj plonĝi en la sekvan, oni improvizis junularan feston en la arbaro kiu impone ĉirkaŭas la Centron "Borja". Menciindas ankaŭ la fakton, ke tie rajtis kampadi ĉiuj kiuj deziris, kaj tiel ĝui la naturon...

Kvina kongrestago. Bela prelego

Je la deka matene katolika meso celebrita en Esperanto de pastro Casanoves, kiu ankaŭ bele predikis pri la semisto, el kiu ni citos ĉi-sube kelkajn paragrafojn kiuj klare montrantas ion kion ni jam scias: la talenton de nia samideano. Li evidentigis certan analogion inter la semisto de la Evangelio kaj la laboro de la esperantistoj, kaj citis jenajn evangeliajn frazojn: "la semo estas ja principe efika, ĝi estas egalkvalita. Sed ne estas



la grundo sur kiun ĝi falas -apud vojo, sur ŝtonplena loko, inter dornoj, sur bona tero- kaj, sekve, malgraŭ la sama povo de la semo, por ekĝermi kaj kreski kaj flori kaj frukti, nur tiuj kiuj falas sur la bonan teron sukcesas. Krom tio, la kamparano devas senlace labori dum la tuta tago por pretigi kaj plibonigi la grundon per grasumo, li devas ĝustatempe akvumi, priŝprucigi, ktp.". Tute same okazas al la esperantistoj. Ni ĉiuj konas la famajn versojn de "La Vojo" de Zamenhof: "Ni semas kaj semas, neniam laciĝas/ Pri l'tempoj estontaj pensante/ Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas/ Ni semas kaj semas konstante..."

Kiom da kursoj, artikoloj, prelegoj, intervjuoj, forumoj, radio kaj televid-elsendoj! Kiom da afiŝoj kaj flugfolioj!. Jes, cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas, milionoj perdiĝas! kaj tamen "ni semas kaj semas, neniam laciĝas", ĉar ni estas konvinkitaj pri la povo de la semo, pri la valoro kaj taŭgeco kaj eĉ nepre bezono de Esperanto en la nuna epoko, kiam la Eŭropa kaj tutmonda lingvo-problemo ne nur ne solviĝas, sed pli kaj pli akriĝas, ĉar unuopaj popoloj fariĝas pli kaj pli konsciaj pri sia identeco kaj pri la egalrajteco de siaj lingvo kaj kulturo. Tial, kaj malgraŭ la ne ĉiam kuraĝigaj rezultoj videblaj, "ni semas kaj semas konstante"...

Post tiu bela komparo inter la Evangelia semisto kaj la esperantistoj kiel konstantaj semantoj de la propraj ideoj, pastro Casanoves komentis interesan artikolon de la ĉefepiskopo de Barcelono, publikigita en la dimanĉa bulteno "Full Dominical" sub la titolo "Kredantoj kaj esperantoj". En tiu artikolo la ĉefepiskopo skribas interalie: "Ni, la filoj de Dio, estas homoj de espero. Ni ne estus homoj de kredo se ni ne esperus en la estonteco trans la surtera vivo. Al multaj katolikoj ne mankas la kredo je Dio...kio mankas al ili estas la espero. Multaj, antaŭ tiom da malfacilaĵoj kaj malĝojigaj travivaĵoj, diras sen espero: nu, bone. Al kio utilas tiom da klopodoj? Ne valoras la penon! Al tiuj senkuraĝuloj

ni memorigu, ke esti esperanto estas io ĝisfunde radikale kristana. Tiel skribis la episkopo.

Al tiuj esprimoj, la predikanto kuraĝis aldoni: "Se ĉiu kristano havas la devon esti esperanto, kion mi diru pri kristano kiu estas ankaŭ esperantisto? Certe li devas esti ne nur esperanto sed ankaŭ esperantiganto: li devas esti semanto de espero, doni esperon al la aliaj...

Kaj per tiu ĉi komento, P.Casanoves brile kompletigis la ideon pri la Evangelia semisto kaj la laboron de la esperantistoj. Niaj legantoj sendube bone komprenis, ke same kiel en la raporto de la ceteraj prelegoj de tiu ĉi kongreso, ni ne povas reprodukti la tutan predikon de P.Casanoves, ĉar por tio ni devus publikigi ne gazeton sed libron; tamen ni klopodis speguli la esencojn de tiuj prelegoj.

Samtempe okazis la meso kaj la oficialaj ekzamenoj de HEF-ILEI. Kaj apenaŭ sen paŭzo inter unu kaj alia programero okazis la tutlanda publika omaĝo al du elstaraj forpasintaj esperantistoj: Petro Nuez kaj R.Fernández Jurado. Spontane la kunsido fariĝis solena, tenera, grava, kiel decas pri omaĝatoj tre estimataj. Ĉe la prezida tablo sidis, kun la HEF-Prezidanto Alonso, gesamideanoj Trini Garcia, S.Aragay, V.Hernández Llusera kaj Jordi Carbonell. Kiel preleganto nia bona amiko Giordano Moya. La oracio de Giordano ne konsistis el la kutima retoriko kaj banalaj laŭdoj honore al la forpasintoj, tute ne!, li unue priskribis la motivojn kiuj allogis ilin ambaŭ entrepreni taskon tute altruisman, bonfaran, idealisman. Efektive, tiuj kiuj laboras nur por propra profito ne troviĝas en niaj vicoj, nur troviĝas tiuj kiuj sin donacas parte aŭ tute; kaj tuj Giordano profilis la figuron de vera esperantisto: idealisto celanta disvastigi la ideon pri interkompreniĝo de homoj kaj popoloj, kun la fervoro de nova donkifoto. Kaj metis kiel modelon, ne nur tiujn du homojn en tiu momento omaĝatajn, t.e. P.Nuez kaj Fernández Jurado sed ankaŭ alian paron nepre menciindajn: Ramón Molera kaj Lluís Mimó, kvar gravulojn de la kataluna E-Movado forpasintajn en plena matureco, kiam tiom multe oni esperis de ilia kapablo kaj klopodoj...

Difininte la trajtojn de ideala esperantisto, la disertanto parolis pri la viveroj de ambaŭ omaĝatoj: Petro Nuez, forpasinta en 1984^a kiam apenaŭ estis 56-jara, estis librotenisto kaj havis grandan intelektan malkvietecon. Kiam li mem volis inventi internacian lingvon en 1956^a, li legis anoncon pri Esperanto. Tuj li fariĝis esperantisto, kio ebligis al li instrui la Lingvon. Li kutime gvidis tiom da kursoj kiom da tagoj havas unu semajno: en la Kooperativo de Manteksisoj, Barcelona Esperanto-Centro, Amikoj de UNESKO, Anarkista Grupo, Katolika Centro, Vegetarana Societo, ktp. Paralele, li ankaŭ prelegis kaj kunlaboris en multenombraj esperantistaj aktivaĵoj. Al Petro oni ŝuldas la eldonon de la poŝa Vorta-

ro Sopena, ĉar li instigis la esperantistan scienciston Paluzie pretigi tiun Vortaron, kies redakton li ankaŭ helpis. Petro estas ankaŭ aŭtoro de la lernolibro "Curso Elemental de Esperanto" plurfoje reeldonita. Ni povus plenigi multajn paĝojn se ni devus mencii liajn plej elstarajn meritojn; ni substreku nur, ke li estis homo nefermita, komprenema, tolerema kun ĉies opinioj, honesta homo...



Pri Fernández Jurado, la preleganto citis liajn plej gravajn viverojn: li naskiĝis en Almeria kaj venis kun sia familio en Barcelonon kiam apenaŭ li estis kvinjara infano kaj la ekonomiaj rimedoj de lia familio estis pli ol modestaj. Li studis en ordinara ŝtata lernejo kaj, nur dekdujara, jam laboris kiel dungito en meblofabriko, kie li lernis sian profesion. Spirite malkvieta li multe legadis, kaj fariĝis esperantisto en la Kooperativo de Manteksistoj. La 19an de Julio 1936a li troviĝis en Barcelono kaj batalis kontraŭ la ribelantaj militistoj. Poste, li batalis en la frontoj de Huesca kaj Teruel ĝis li atingis la rangon de majoro.

Grave vundite dum batalo li estis kaptita de la trupoj de Franco suferante la teruran kalvarion de longa restado en prizono "Modelo" de Barcelono: malsata, tute lama kaj atendanta angore la momenton esti mortpafita, ĉar tio okazis tie ĉiutage. En tiu prizono li konatiĝis kun Delfi Dalmau, poligloto, esperantisto kaj akademiano, kio ebligis al li perfektigi sian Esperantoscion kaj bone lerni la katalunan. Ellasite li migris Cilion kie li loĝis 17-jarojn kaj kie li ankaŭ instruis Esperanton, sed li sopiris al Katalunio kaj fine revenis en Barcelonon.

Fernández Jurado estis aktivulo de la kataluna Socialista Partio, konsilanto pri Kulturo de la urbestro de Castelldefels, fondinto kaj instruanto de la Esperanto-Grupo de la menciita urbo, diplomita instruisto de la kataluna lingvo, gvidanto de urbestroj kaj fine li estis elektita deputito en la Kataluna Parlamento: preskaŭ mortanta li ĉeestis la inaŭguron de tiu Parlamento. Multaj gravaj politikistoj katalunaj, kun multaj amikoj liaj omaĝe akompanis lin, la idealiston, ĝis lia lasta restadejo.

La emocia omaĝo finiĝis per prezento de bukadoj al la familianoj de ambaŭ elstaraj esperantistoj. HEF plenumis per tiu ĉi aranĝo, devon neprokrasteban, kaj oni devas konfesi, ke la marko: Katalunio kaj la 50a Hispana Jubilea E-Kongreso estis la adekvataj.

Laŭ la programo estis tuj prezentitaj la tri lastaj eldonitaj libroj. La verkoj estas:

"Metodo de Esperanto, Bilbao", kies aŭtoro, Julio Juanes Sainz, prezentis ĝin indikante ĝian karakteron frazmetodan. Pro modesteco, la libro, ne surportas la nomon de la aŭtoro, kaŝita sub la pseŭdonimo "Bilbao" sed konate estas, ke per ĝi oni gvidis multenombrajn kursojn.

La dua libro prezentita estas: "Kompleta Lernolibro de Regula Esperanto -Komplementa volumo-" de Ludoviko Mimó, eldonita de Esperanto-Centro Paderborno kaj prezentita de V.Hernández Llusera.

Fine, Salvador Aragay, prezentis kiel eldonisto la verkon "Esperanto en Prospektivo", kies aŭtoro, Giordano Moya, mem legis diversajn komentariojn pri ĝi faritajn de elstaraj esperantistoj.

Preskaŭ samtempe, en alia salono oni kunvenis gvidate de s-ano A.Casquero por spekti belegan kasedon pri Valencio, urbo gastigonta la universalan kongreson, kaj aŭdi de li kelkajn prikonsiderojn.



F. García Lorca

De la 13a ĝis la 14a kaj en la kadro de ASKH okazis la unua parto de emociplena kaj belega prelego: per neofta kaj sentoplenta vervo, samideano Miguel Fernández Martín regalis nin per unuhora poezia elmontro pri la temo "Sur la spuroj de Garcia Lorca". Malfacile oni povis aŭdi iam antaŭe pli belan kaj kompletan disertacion. La emocio kaj admiro estis komuna en la koro de la ĉeestantoj.

De la 17a ĝis la 18a h., dua parto de sama prelego pri Lorca. Denove vibrigis nin s-ano Fernández kantante sorĉajn andaluziajn koplojn ĝuste tiel kiel konceptis Garcia Lorca, aŭ recitante la plej famajn poemojn de Federiko, aŭ dokte pri-skribante viverojn de la mita poeto: nia samideano parolis al ni pri la amikaj rilatoj de Lorca kun tiu elstara intelektulo de la 2a hispana respubliko Fernando de los Rios, katedra profesoro de la poeto en la universitato de Granada, kaj pri Manuel de Falla, lia muzika profesoro, kaj pri tiuj liaj amikoj en la Restadejo de Studentoj en Madrido: Dali, Buñuel, Prados, ktp. Poste, la kompetenta disertanto parolis pri la teatro de Lorca, talente kiel tradukinto de du el la plej gravaj teatroverkoj de Federiko, ...kaj kantis, kaj recitis plu ĝis larmoj ŝprucis pro emocio, de multaj ĉeestantoj, kies manoj brulis pro entuziasma kaj fervora aplaŭdado. Neniam antaŭe oni aŭdis ion similan en Esperantujo pri estetikaj ideoj!!! Tute neforgesebla prelego!

Post mallonga paŭzo okazis la fermo de la kongreso. Unue, oni disdonis diplomojn al la sukcesintaj ekzamenitoj laŭ jenaj gradoj:
Elementa lingvo-scio: Pili Ferrer, José V.Ferrer, Lorenzo López, Jesus Marco, Zaida Mellado, Marcelino Mora Vilaltella kaj Manuel Parra.

Meza lingvo-scio: Alberto Bermell, Julio Tarin kaj R.M.Palao Pons.

Supera lingvo-scio: Antonio Miguel Sánchez Pérez.

Esperanta Instruisto: Aurelio Solis Pi.

Oni liveris ankaŭ la premion Klara Silbernik al la edzino de de samideano E.Piquero, sinjorino Matilde de la Fuente, de Zaragozo.

Simpla paroladeto de la HEF-Prezidanto fermis oficiale la 50an Jubilean Esperanto-Kongreson post aprobo de jena

REZOLUCIO: La 50a Hispana E-kongreso nun okazanta en Sant Cugat del Vallés kun partopreno de 210 gekongresanoj el 14 landoj, oficiale kaj unuanime aprobas jenajn tri punktojn:

a) *Dankas la honorigan apogon kaj malavaran subtenon, kiujn ĝi trovis en ĉiuj diversaj institucioj de Katalunio, sinteno kiu plene respondas al la historio de Esperantismo en Katalunio.*

b) *Dankas la ampleksan atenton, kiun nia kongreso ricevis de la sociaj informrimedoj. Tute speciale dankas la tiurilatan katalunlingvan informon elsenditan de TVE-1, ĉar ĝi estas teknike elstara, kaj laŭ enhavo rigore objektiva.*

c) *Aprobas jenan deklaron kaj agadprincipon: la uzantaro de Esperanto enhavas homan kaj kulturan kapitalon, kiu jam de antaŭ unu jarcento laboras je la servo kaj por la bono de la socio. Ni tial opinias justa, ke per siaj institucioj la socio pagu mem la servadon, sed se provizore ankoraŭ ne la servantojn. En tiu kadro, la Kongreso petas kiel eble plej ĝeneralan institucion apogon (ankaŭ kontrolon) por tiuj konkretaj planoj, kiujn Hispana Esperanto-Federacio nun malvolvas, kaj inter kiuj elstaras la muntado de Televida kurso pri Esperanto kaj la organizado de periodaj Internaciaj Preuniversitataj Somerkursoj en Esperanto.*

Post la vespermanĝo, je la deka nokte, okazis tre interesa koncerto de "Bel-kanto" de la bulgara sopranulino M.Ludmila Kotzeva, majstre piane akompanata de Joan Manau. Nia bela sopranulino kantis kun granda emocio "Ho mia kor'", teksto de Zamenhof. Poste, en Zueignung" de R.Strauss, fraŭlino Kotzeva montris ke ne vane ŝi estas solistino de

Ĉambro-muzika ensemblo, ĉar majstre ŝi sekvis la partituron kaj talente vibrigis la malaltajn tonojn. La populara "Kalinka" donis okazon al la publiko ĝoje akompani laŭritme la kantistinon. "Caro nome" de Verdi kaj "O sole mio" de E.di Capua, kantataj kun vibranta stilo de bona soprana voĉo montris la eblecojn de nia kantistino. La programero pri kiu ŝi faris veran rekreon, laŭ mia opinio, estis "Akvo de la printempo" de S.Rachmaninov. Kompreneble, la ĉeestantaro prave entuziasme aplaŭdadis la belan kantistinon, kiu, verŝajne, preparas turneon, probable inkludante hispanajn urbojn.

Permesu al mi ankoraŭ, karaj legantoj, ion diri pri la pianisto Joan Manau: mi aŭdis lian pianludadon antaŭ kelkaj jaroj kaj mi opiniis tiam, ke ni estis antaŭ promesplena junulo; hodiaŭ oni povas certigi senhezite, ke la juna Manau estas tre bona pianisto...

Post ripoza paŭzo, la kongresanaro ankoraŭ plaĉe aŭskultis en tiu nokto, korusajn kantojn kaj "habaneroj"-n. Aplauĉoj al tiuj kanzonoj kaj artistoj tute ne mankis.



Dum pluraj tagoj, oficisto de la Poŝto deĵoris en la Kongresejo de Sant Cugat uzante ĉi-tiun bele desegnititan poŝtstampilon.

Sesa kaj lasta. Vizito al Barcelono

Kiam la kongreso fakte estis jam finita, dum la mateno de lundo, oni vizitis per aŭtobusoj de la Urbeŝtaro de Barcelono, la konstruaĵojn de la Olimpikaj Ludoj, granda parto el ili ankoraŭ ne finitaj.

Belega la palaco de Sant Jordi, tre moderne konceptita por praktiki sportojn. Admirinda la olimpika luma cirklo, kies efektoj dumnokte, sendube plezurigos la vizitantojn!

...Kaj ĝis la venonta kongreso!

La Redakcio.

Administra angulo


Ni atentigas niajn legantojn, ke estonte ĉiuj menseĉoj oni devos nepre sendi al nova Kasisto de HEF S-ro José M^a Ber-

nabeu Franco, kies adreso aperas en la 1^a paĝo de ĉi bulteno.

Ni kvitanças hodiaŭ du menseĉojn: De S.M.P.M.25.000-Ptoj

De Sabino Pelegrin, (Egea) 1.600-"

PROFITU POR ESPERANTO!



Lastatempe ĉiuj enlandaj jurnaloj informis pri la nova projekto pri reformo de la konata Imposto pri la Rentoj de Fizikaj Personoj (I.R.P.F.), konata vulgare kiel «la declaración». Laŭ la nuna teksto, sendita de la registaro al la Parlamento por ĝia pritrakto, la menciita projekto enhavas diversajn modifojn vaste raportitaj, sed por la hispana esperantomovado nur unu el tiuj estas interesa: rabati 10% el donacoj efektivitaj al «Fundaciones reconocidas».

Ja tiu ebleco ekzistis iam antaŭe, kvankam dum la lastaj jaroj malaperis el la pritraktita imposto. Cetere, la esperantistaro, bedaŭrinde, neniam profitis tiun eblecon.

Ni, la hispana esperantomovado, havas juran instancon kiu plenumas tiajn postulojn, t.e. «Fundación Esperanto». Ĝi estas akceptita kiel fondaĵo «benéfico-docente» kaj pro tio ĝi apartenas al tiuj fondaĵoj kontrolataj kaj regulataj de la Ministerio pri Edukado. Tio ja malfaciligas subvencipetojn de Ministerio pri

Kulturo, kiu zorgas kaj helpas kulturajn fondaĵojn.

Ĉar, tamen, tiu estas provizora teksto, kiu devas travivi la kutimajn parlamentajn diskutojn kaj modifojn, ni devos atendi ĝis la apero de la definitiva teksto de la citita Imposto pri la Rentoj de Fizikaj Personoj por konstati ĉu tiu ebleco estas efektiva. Tiam, ne forgesu ke el ĉiu 100 pesetoj donacitaj de vi al «Fundación Esperanto» vi ricevos repagon de 10 pesetoj el la ŝtato pere de via imposta deklaro, kio fakte signifas ke vi donacas 90 pesetojn dum la ŝtato kontribuas per aliaj 10 pesetoj. Jen facila formo eltiri monon el la ŝtato.

La projekto ankaŭ mencias la «asociaciones de interés público» kaj tio ja rilatas al Hispana Esperanto-Federacio mem. De jaroj oni klopodas pretigi dosieron por atingi tian agnoskon. Do, nun oni devus rapidigi la bezonatajn laborojn kaj demar ŝojn, ĉar el tio povus veni certan profiton por nia Federacio.

Ne forgesu tion kaj helpu la movadon!

JUAN AZCUENAGA
MIGUEL GUTIERREZ

Viglas la movado

Ekstremaduro.- M^a Rafaela Urueña, katedra profesorino pri Internacia Juro en la Universitato de Valladolid, prelegis pri Esperanto en lingvo-lernejo de Cáceres kaj en la Kulturdomo de Badajoz. En ambaŭ urboj tre favore impresis la argumentojn de D-rino Urueña, kies precipa celo estas helpi la esperantistan agadon de niaj kolegoj s-anoj Cabezas kaj J.Gonzalez en ambaŭ urboj, kies kursoj plene sukcesas.

Asturio.- La O.K.K. de la 3a Asturia kongreso de Esperanto jam anoncis la interesan programon de tiu evento okazonta en Gijón de la 12a ĝis la 14a Oktobro 1990, el kiu indas elstarigi la prelegon de la brila hispana poeto Miguel Fernández kaj la asembleon de la Esperantaj Grupoj de la Kantabra Marbordo.

Gvidrezolucio

Havano.- La 75a Universala Kongreso de Esperanto kunveninte en Havano (Kubo) de la 14a ĝis la 21a de Julio 1990 kun 1614 partoprenantoj el 54 landoj, kaj traktinte la temon "Esperanto, evoluo, kultura diverseco"

konstatas

ke la kultura diverseco estas grava parto de la homa heredaĵo kaj ke la morto de lingvoj kaj kulturoj estas signifa perdo por la homaro;

ke same kiel pri la kvalito de la biosfero, ni respondecas pri la heredigo de tiu kultura diverseco al postaj generacioj; ke el lingvoj kaj kulturoj konstante evoluas: minoritatoj aperas kaj malaperas dum la monda socia kaj ekonomia situacio ŝanĝiĝas;

ke, aliflanke, simpla ignoro de la rajtoj de minoritatoj kaj koncentriĝo je plibonigo de materiaj vivkondiĉoj endanĝerigas la liberecon de unuopaj popoloj evolui laŭ propra maniero;

ke sekve necesas krei strukturojn por efike administri diversecon en mondo kie la moderna vivo emas kondiĉi al ĉiam pli da unueco;

bonvenigas

la iniciaton de UNESKO lanĉi la Jardekon de Kultura Evoluigo kaj notas, ke la Kongresa Temo estis rekte ligita al tiu jardeko;

atentigas

pri la valoro de Esperanto kiel ponto inter la lingvoj kaj kulturoj kaj medio por interŝanĝoj;

alvokas UNESKON

ke ĝi pli aktive utiligu Esperanton kiel rimedon de kultura interŝanĝo;

rekomendas

al la diversaj Esperanto-organizaĵoj ke ili partoprenu en la Jardeko kaj konsekvence atentu en la agado la ligojn inter la Internacia Lingvo kaj kultura diverseco.

REZULTO DE LA BELARTAJ KONKURSOJ UEA-1990.-

Kun plezuro ni legis la rezultojn de la Belartaj Konkursoj UEA-1990, kiuj registras unu el la sukcesoj plej okulfrapaj de esperantista junulo, nome Georgo Kamaĉo.

Efektive, nia madrida samideano gajnis la duan kaj trian premiojn pri Poezio de la Belartaj Konkursoj UEA-90. Ankaŭ la unuan, duan kaj trian premiojn pri Prozo de sama konkurso. Kaj, ankoraŭ honoran mencion pri Eseo.

Li sola preskaŭ monopoligis ĉiujn premiojn de la menciitaj Konkursoj de UEA. Ni, la hispanaj esperantistoj, kiuj bone konas la talenton de samideano Kamaĉo, jam atendis tiun sukceson, sed ne pro tio ni ĝojis malpli, ĉar tio signifas la publikan agnoskon, en kaj ekster nia lando, de la meritoj de nia juna kolego.

La Redakcio de "Boletín" gratulas nian samideanon Georgo Kamaĉo pro lia sukceso kaj multe esperas jam de nun, kaj ankaŭ estonte, pri liaj kapablo kaj beletra sciado.

Gratulon, amiko Georgo!

La Redakcio.

Lirikaj paĝoj

GAZALO PRI LA OBSKURA MORTO.

Deziras mi tradormi la sonĝon de la pomoj,
foriĝi al la granda tumulto de l' tombejoj.
Deziras mi tradormi la sonĝon de l' infano
volinta en marmezo fortranĉi sian koron.

Neniam plu ripetu, ke sangon ne ellasas la mortintoj;
ke la putrintaj buŝoj ne ĉesas peti akvon.
Nenion sciu mi pri l' martirigoj far la herboj
nek pri la luno kun buŝo de serpento,
kiu laboras antaŭ la tagiĝo.



Mi volas dormi iom,
minuton aŭ jarcenton;
sed ĉiuj sciu ja, ke mi ne mortis;
ke kuŝas ora stalo mialipe;
ke estas mi la eta amik' de Uest-vento;
ke estas mi la ega ombro de miaj larmoj.

Min kovru per vualo ĉe aŭroro
sur min jetonta plenmanojn da formikoj,
en akvo dura trempu miajn ŝuojn,
ke glitu la pinĉilo de la aŭror-skorpio.

Ĉar volas mi tradormi la sonĝon de la pomoj
por lerni ploron pretan purigi min de tero;
ĉar volas vivi mi ĉe la infan' obskura
volinta en marmezo fortranĉi sian koron.

Federiko Garcia Lorca

(El la kolekto "Divan' de Tamarit'")

Trad. de Miguel Fernández Martin

Esperantisto: La Libro-Servo de HEF celas peri al siaj membroj ĉiujn
titolojn, kiuj nuntempe estas akireblaj en aŭ pri Esperanto.


Verkisto, prireligia politikulo, filologo kaj poeto hebrea-hispana naskiĝinta en Mérida en la jaro 993 kaj edukita en Kordovo, kie li estis disĉiplo de la talmudisto Mosé ibn Hanok kaj de la filologo Hayyúy.

Post la falo de la Kordova Kalifejo (1013) li translokiĝis al Malago, kie li oficis kiel Sekretario de la veziro Ibn Arif. Oni perdis grandparte de lia verkaro pri talmudaj studoj kaj pri filologio, tamen oni konservas multajn el liaj poemoj publikigitaj en 1933 en la libro "Diván" enhavanta 1742 poemojn redaktitajn en la hebrea, kun riĉarkinda influo de la araba poetiko, same en la versformo (kasido)* kiel en la temaro strikte araba. Jen unu el liaj poemoj:

PRINTEMPO. -

*Jam venis gaja printempo
forigante krudan vintron;
jam venis al nia tero
kun la blanka vostopinto
la turto, de raŭka kverco,
kies kant' sur arbotigo
imitas duan turt' eĥon
po mallongaj intermitoj...*

*Kiuj scias pri amecoj,
haste tondu la liliojn
odorantajn al flarsenso
kiel disĵetita mirho
aromanta la foreston
de veraj bonaj amikoj
mankantaj al fideleco,
kiel vir' al amatino.*



Laŭ konstatas Mosé ibn Ezra, oni povas certigi, ke li estis aŭtoro de almenaŭ tri poeziaj verkoj: "Nova Salterio", "Novaj proverboj" kaj "Nova Eclesiastes", kun temoj tiel variaj kiel pri amikeco, vino, elegioj, kantoj, kaj eĉ politikaj kaj militistaj poemoj.

Tiu ĉi eminenta poeto forpasis en la jaro 1056.

Antonio Marco Botella

(*) Kasido: (El la araba "qasida") klasika poezia formo el la antikva araba poetiko, konsistanta el 30 ĝis 150 versoj, kies lastaj hemistikoj havis saman rimon. Kutime, ĝi estis dividita en tri partoj: priama prologo, priskribo de vojaĝo tra la dezerto kaj fina panegiro pri la persono al kies omaĝo oni dediĉis la poemon.

Depósito legal: Z-334-90
Presejo: Aragonesa de Reproducciones Gráficas

Libervola **ESPERANTO-KURSO** ĉe la INSTITUTO POR LINGVOJ de la Universitato de Santiago de Compostela
Kun la kunlaborado de **HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO**



Projekto pri **INTERNACIAJ PREUNIVERSITATAJ SOMERKURSOJ EN ESPERANTO**

CURSO (voluntario) **DE ESPERANTO** en el INSTITUTO DE IDIOMAS de la Universidad de Santiago de Compostela
Con la colaboración de la **FEDERACIÓN ESPAÑOLA DE ESPERANTO**

Proyecto de **CURSOS DE VERANO PREUNIVERSITARIOS INTERNACIONALES EN ESPERANTO**

Adreso / Dirección: Curso de Esperanto.– Instituto de Idiomas.– Praza de Mazarelos, s/n.– E–15703–Santiago de Compostela.– Hispanio / España.

Informilo / Boletín Informativo n-ro 1.– Majo / Mayo 1990

(1)

La ĉefa celo de tiu ĉi projekto estas muntado de periodaj **INTERNACIAJ PREUNIVERSITATAJ SOMERKURSOJ EN ESPERANTO**, kies unua sesio okazu en 1993, paralele al la 78^a Universala Kongreso de Esperanto (en Valencia, Hispanio).

Laŭ la plano, en la Kursoj partoprenos internaciaj teksto-aŭtoroj, profesoroj kaj lernantoj.

La efektiva nivelo, kiun la projekto atingos, ja dependas de la grado de kunlaborado fare de profesoroj, fakuloj kaj terminologoj diverslandaj, kiuj uzas Esperanton, kiel ankaŭ de la instituciaj kaj financaj apogoj, kiujn oni atingos.

Tiu ĉi projekto estis unuafoje prezentita de ĝia iniciatinto en la kadro de **INTERKOMPUTO '82** (Budapeŝto) kaj poste dufoje kadre de sesioj de la **AKADEMIO INTERNACIA DE LA SCIENCIOJ**, en ties sidejo en San Marino, en la jaroj 1984 kaj 1986. En ĉiuj tri okazoj la projekto ricevis ĝeneralan aprobon, kaj pluraj ĉeestantaj fakuloj promesis –parole aŭ skribe– sian helpon, kvankam ĝenerale sub kondiĉo, ke la projekto ricevu almenaŭ institucian ekapogon.

“Interkomputo” kaj “Akademio Internacia de la Sciencioj” estas du el la institucioj, asocioj k.s., kiuj oficiale kaj labore uzas Esperanton.

Post tia prezento, la iniciatinto de la projekto malvolvis plurajn aferojn (korespondado, redaktaj provoj, kontaktado kun institucioj, k.s.), pri kiuj ni informos adekvate en la sekvaĵo kaj en estontaj numeroj de tiu ĉi informilo.

Post pluraj interrompoj kaj prokrastoj en la antaŭviditaj fazoj –oftaj ĉe aranĝoj (ankoraŭ) ne instituciigitaj–, la projekto ŝajne faras siajn unuajn firmajn paŝojn, tiel ke oportunas publikigado de tiu ĉi unua numero de la informilo, kiun ni planis por ĝenerala informado pri la projekto kaj ĝia evoluo.

(2)

Ni prezentas faksimile la tri plej gravajn dokumentojn ĝis nun ricevintajn pri la projekto (el kiuj la unua estas en la hispana, kaj la du aliaj en la galega lingvo):

La finalidad principal de este proyecto es la realización de unos **CURSOS DE VERANO PREUNIVERSITARIOS INTERNACIONALES EN ESPERANTO** de carácter periódico y cuya primera sesión tenga lugar en 1993, paralelamente al 78^o Congreso Universal de Esperanto (en Valencia, España).

De acuerdo con el plan, en los Cursos tomarán parte autores de textos, profesores y alumnado internacionales.

El nivel que realmente alcance el proyecto depende desde luego del grado de colaboración por parte de profesores, especialistas y terminólogos de diversos países y usuarios del Esperanto, así como de los apoyos institucionales y financieros que se alcancen.

Este proyecto fue presentado por primera vez por su iniciador en el marco de **INTERKOMPUTO '82** (Budapest) y posteriormente dos veces dentro de las sesiones de la **ACADEMIA INTERNACIONAL DE LAS CIENCIAS**, en su sede de San Marino, en los años 1984 y 1986. En las tres ocasiones recibió el proyecto general aprobación, y varios especialistas presentes prometieron –de palabra o por escrito– su ayuda, aunque generalmente bajo la condición de que el proyecto recibiese al menos apoyo institucional inicial.

“Interkomputo” y “Academia Internacional de las Ciencias” son dos de las instituciones, sociedades, etc., que usan el Esperanto oficialmente y como lengua de trabajo.

Después de esa presentación desarrolló el iniciador del proyecto diversas tareas (correspondencia, ensayos de redacción, contactos con instituciones y análogos) de las que informaremos adecuadamente en lo que sigue y en futuros números de este boletín.

Después de varias interrupciones y aplazamientos de las fases previstas –frecuentes en cuestiones (todavía) no institucionalizadas–, el proyecto da al parecer sus primeros pasos en firme, de manera que se hace oportuna la publicación de este primer número del boletín previsto para información general acerca del proyecto y de su evolución.

Presentamos en facsímil los tres documentos más importantes recibidos hasta ahora acerca del proyecto (de los cuales el primero está en lengua española y los otros dos en la gallega):



*El Director del Gabinete del
Ministro de Educación y Ciencia*

Madrid, 3 de Octubre de 1989

Sr. D. Antonio Alonso Núñez
Presidente de la Federación Española
de Esperanto
Rosa, 26 - 5º C
15701 SANTIAGO DE COMPOSTELA
(La Coruña)

Distinguido Sr.:

Me refiero a su carta, y al "dossier" que con ella me remite, sobre las actividades y proyectos de esa Federación Hispánica de Esperanto.

Como Vd. ya conoce, por las conversaciones que ha mantenido con un Asesor de este Gabinete, no es fácil conectar aquellas con los programas del Departamento.

No obstante, y en atención a la finalidad cultural, interés pedagógico y a los destinatarios de los Cursos Preuniversitarios Internacionales en Esperanto que se proyectan celebrar en relación con el 78º Congreso Internacional, me es grato comunicarle, en nombre del Sr. Ministro, que será posible,

de forma extraordinaria y por una sola vez, otorgarle una ayuda económica de 200.000 ptas. para contribuir a subvenir los gastos de organización de dichos cursos.

En consecuencia, oportunamente conectarán con Vd. los servicios técnicos del Departamento para concretar la efectividad y condiciones de dicha subvención.

Un cordial saludo,

Enrique Guerrero Salom



UNIVERSIDAD DE SANTIAGO
INSTITUTO DE IDIOMAS

22 de diciembre 1989

Sr. D. Antonio Alonso Núñez
Instituto de Idiomas
Santiago de Compostela

Comprácame acusarlle recibo do dossier encol do proxecto "Cursos Preuniversitarios Internacionais en Esperanto".

En relación con este tema, éme grato comunicarlle que esta Universidade, a través do Instituto que dirixo, expresa a súa aprobación de principio ó proxecto, e que para atender a gastos de funcionamento e infraestrutura do mesmo creará unha praza remunerada en xaneiro de 1990.

Saúdoo atentamente,

Prof. Dr. Tomás Ximénez Risco
Director do Instituto de Idiomas



*Xunta de Galicia
Consellería de Educación e
Ordenación Universitaria
Dirección Xeral de Política
Lingüística*

Manuel Regueiro Torreiro

Santiago de Compostela, 6 de xuño de 1990

Sr. D. Antonio Alonso Núñez
Instituto de Idiomas
Universidade de Santiago
SANTIAGO DE COMPOSTELA

Moi Sr. meu:

Prácame recibi-lo escrito que con data de 10 de maio pasado, dirixe ó Sr. Conselleiro de Educación e Ordenación Universitaria, en relación cos Cursos Preuniversitarios Internacionais en Esperanto que pensan celebrar no ano 1993, e confírmolle no seu nome que a súa proposta será estudiada con interese polo noso departamento.

Quedando á espera das súas novas, reciba un cordial saúdo.

La esperanta traduko de iliaj ĉefaj partoj jenas:

“La Direktoro de la Kabineto (=Konsilantaro) de la [Hispana] Ministro pri Edukado kaj Scienco.– (...) – Prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio.– (...)– Rilate vian leteron kaj la dosieron, kiun kun tiu vi sendis al mi, pri la agado kaj projektoj de Hispana Esperanto-Federacio.– Kiel vi jam scias pro la interparoloj de vi malvolvitaj kun konsilanto de tiu ĉi Kabineto, ne facilas konektado de tiaj aferoj kun la programoj de la Ministerio.– Tamen, kaj atentante la kulturan celon, la pedagogian intereson kaj la personojn celatajn por la Kursoj (...), estas al mi agrable informi vin, nome de s-ro la Ministro, ke eblas, eksterordinare kaj nur unufoje, doni al vi monhelpon 200000-pesetan, kontribue al la elspezaro por organizado de la dirtaj Kursoj.– Elkoran saluton, (...)”

“Universitato de Santiago [de Compostela].– Instituto por Lingvoj.– (...)– Estas plaĉe al mi kvitanci ricevon de via dosiero pri la “Internaciaj Preuniversitataj Kursoj en Esperanto”.– Rilate tiun aferon, estas al mi agrable informi vin, ke tiu ĉi Universitato, pere de la Instituto kiun mi direktas, esprimas sian principan aprobon al la projekto, kaj ke por atenti elspezojn de ties funkciado kaj rimedaro, estigos salajratan laborpostenon en januaro 1990.– (...)– Direktoro de la Instituto por Lingvoj”.

“Registaro de [la Aŭtonoma Komunumo] Galegio.– Konsilejo pri Edukado kaj Universitata Ordigo.– (...)– Ĝenerala Direktoro por Prilingva Politiko.– Estas al mi plaĉe ricevi vian skribaĵon (...) al s-ro la Konsilisto pri Edukado kaj Universitata Ordigo, rilate la Internaciajn Preuniversitatajn Kursojn en Esperanto, kiujn vi planas okazigi en la jaro 1993, kaj mi konfirmas al vi lianome, ke via propono estos studita kun intereso fare de nia departemento.– En atendo de viaj informoj, ricevu elkoran saluton. (...)”

Danke al tiaj apogoj, la projekto povas eniri sian unuan fazon de oficiala realigado, kaj tial ni tion sciigas pere de tiu ĉi unua informilo. La projekto-starto estos anoncita ankaŭ en la kunveno de gravaj institucioj de la uzantaro de Esperanto, okazonta en Bruselo en majo 1990 sub aŭspicioj de Belga Esperanto-Federacio, kaj ankaŭ en la 50^a Hispana Kongreso de Esperanto (Sant Cugat del Vallès) kaj en la 71^a Universala Kongreso de Esperanto (Havano), ambaŭ en julio 1990.

La traducción al Esperanto de sus partes principales es como sigue:

Gracias a tales apoyos puede el proyecto iniciar su primera fase de realización oficial, y por tal motivo así lo comunicamos mediante este primer boletín. El comienzo del proyecto será anunciado también en la reunión de importantes instituciones de los usuarios del Esperanto que tendrá lugar en Bruselas en mayo de 1990 bajo los auspicios de la Federación Belga de Esperanto, así como en el 50^º Congreso Español de Esperanto (Sant Cugat del Vallès) y en el 71^º Congreso Universal de Esperanto (La Habana), ambos en julio de 1990.

(3)

Skemo de la taskaro (tuta je internacia nivelo), kaj kalendaro:

(1) Selektado, adaptado aŭ redaktado de tekstoj uzotaj en la Kursoj, kaj ties eldonado. (1985–1993).

(2) Instruado de Esperanto al volontaj geinstruistoj, kiuj poste instruos mem tiun lingvon al volontaj gelernantoj. (1989–1992).

(3) Libervola studado de Esperanto fare de gelernantoj 12–18 jaraĝaj. (1990–1993).

(4) Eventuale, iuj gelernantoj komencos studadon de alia fremda lingvo. (1991–1993).

(5) Pluraj laborkunvenoj de la internacia kunordigantaro de la projekto. (1990–1993).

(6) Eventualaj interfratiĝoj de studento-grupoj. (1991–1993).

(7) Eventualaj Esperanto-apogkursoj pere de amaskomunikiloj. (1992–1993).

(8) La gelernantoj trapasos ekzamenon pri Esperanto kaj, eventuale, ankaŭ pri la dua fremda lingvo. (1993).

(9) Unua sesio de la Kursoj. (1993).

(10) Diplomado kaj fina internacia oficiala informo kun konkludoj, proponoj pri la estonteco de la Kursoj, k.s. (1993).

Esquema de las tareas (todas a nivel internacional), y calendario:

(1) Selección, adaptación o redacción de los textos a usar en los Cursos, y edición de los mismos. (1985–1993).

(2) Enseñanza del Esperanto a profesores voluntarios, quienes luego enseñarán a su vez esa lengua a alumnos también voluntarios. (1989–1992).

(3) Estudio voluntario del Esperanto por parte de alumnos de 12 a 18 años de edad. (1990–1993).

(4) Eventualmente, algunos alumnos comienzan el estudio de otra lengua extranjera. (1991–1993).

(5) Varias sesiones de trabajo de la coordinadora internacional del proyecto. (1990–1993).

(6) Eventuales hermanamientos de grupos de estudiantes. (1991–1993).

(7) Eventuales cursos de Esperanto como apoyo en los medios de comunicación social. (1992–1993).

(8) Los alumnos pasarán un examen del Esperanto y, eventualmente, también acerca de la segunda lengua extranjera. (1993).

(9) Primera sesión de los Cursos. (1993).

(10) Diplomatura e informe final oficial con conclusiones, propuestas acerca del futuro de los Cursos, etc. (1993).

(4)

Kelkaj notoj pri la projekto.

(a) Oni elektis plurkiale la preuniversitatan nivelon:

– Ĉar temas pri internaciaj somerkursoj, krome neoficialaj, oni devas sekvi studplanojn de neniu lando, sed nur selekti temojn bazajn aŭ pli gravajn aŭ malfacilajn, kaj kun ĝenerala valoro por ĉiuj ajn studplanoj. Kaj tio estas plej rekte farebla ĝuste por la preuniversitata nivelo.

– La elektita nivelo estas tiu plej adekvata por la aĝo kaj intereso de la celataj lernantoj. Krome, el tiaj kursoj tiuj gejunuloj povas tiri rektan utilon por siaj tujpostaj universitataj studoj en siaj propraj landoj –kio iĝos premio al ilia preteco kaj diligento ellerni Esperanton por partopreni vere internaciajn vivon kaj etoson, kiel ankaŭ por aliri al scioj.

– Eldonado de la studkajeroj iĝas pli facila kaj malpli kosta.

Algunas notas sobre el proyecto.

(a) Fue elegido por varias causas el nivel preuniversitario:

– Por tratarse de cursos internacionales de verano, y además no oficiales, no es preciso seguir los planes de ningún país, sino tan sólo seleccionar temas básicos o más importantes o difíciles y de valor general para cualesquiera planes de estudio. Tal enfoque es más directamente factible precisamente para el nivel preuniversitario.

– El nivel elegido es el más adecuado a la edad e intereses de los alumnos destinatarios del proyecto. Además, de tales cursos pueden los jóvenes sacar provecho directo para sus estudios universitarios inmediatamente posteriores en sus propios países (lo que será premio a su disposición y diligencia en aprender Esperanto para participar en vida y ambiente verdaderamente internacionales, así como para acceder a saberes).

– La edición de los cuadernos de estudio resulta más fácil y menos costosa.

– Per tiaj kursoj oni helpas ŝtopi breĉon en la ĝisnuna organizado de Esperanto-uzantoj, provizante ponton inter la jam iom abunda instruado pri Esperanto je elementa aŭ meznivela studado kaj la ekfloranta universitata kaj similnivela laboro per Esperanto en akademioj, universitatoj kaj aliaj institucioj, kiel ankaŭ en entreprenoj, turismo, ktp.

– La terminologia laboro estas pli abunda kaj pli facile farebla ĝuste por la preuniversitata nivelo.

(b) Iom pri la traktotaj temoj kaj pri redaktolaboroj:

– Principe, la Kursoj ofertu programojn pri diversaj temoj, tiel ke la gelemantoj povu elekti laŭ siaj interesoj aŭ plaĉoj (matematiko, fiziko, kemio, biologio, geografio, historio, juro, filozofio, literaturo, esperantologio, ktp). La komenca ofertaro, tamen, ja dependos antaŭ ĉio de la ĝis tiam disponeblaj libroj kaj de aliaj cirkonstancoj.

– Objektoj de speciala atento kaj zorgo estu la humanisma enfokusigo de ĉiuj temoj, la sistema kontrastigado de klasikaj kaj modernaj konceptadoj en scienco kaj de diversaj juraj sistemoj, la mondismaj konceptado kaj edukado, k.s., tiel ke ni disponu bazan bibliotekon por preuniversitata nivelo, ne nur rigoran laŭ faka vidpunkto, sed ankaŭ riĉan je etikaj valoroj kaj provizantan demokratian alireblecon al scioj.

(c) Pluraj el la verkoj de la katalogo de diversaj institucioj de Esperanto-uzantoj (Universala Esperanto-Asocio, Someraj Universitataj Kursoj, Scienca Eldona Centro, k.a.) estas jam rekte utilaj por la projekto, kaj aliaj bezonos adapton al ties celo kaj nivelo. Plurajn aliajn oni tradukos el aliaj lingvoj. Tamen, la plejparto el la bezonataj studkajeroj estos rekte verkitaj por la projekto. (Estas espereble, ke se la projekto serioze enradikiĝos, pluraj naciaj kaj internaciaj institucioj helpos per rajtigo traduki kaj publikigi el siaj verkostokoj, eventuale eĉ per financado de la eldono).

(d) Oni planas, ke por ĉiu selektita studtemo ekzistu studkajero kun 50 ĝis 100 paĝoj. Ĉar temas pri prova eldono, kaj krome por pli malgranda kosto, oni prezentos la tekstojn sub formo de presitaj lernejoj kajeroj, laŭ granda DIN A4, kun nuraj surdorsaj agrafoj anstataŭ biindaĵo.

Por ĉiu unuopa studkajero laboru po unu internacia skipo da fakuloj kun po unu sekretario-redaktoro. Ni taksas ke temus pri tre bona sukceso, se por la unua kursosesio ni disponus kelkajn 20 kajerojn.

(e) La iniciatinto de la projekto iĝis ankaŭ sekretario-redaktoro por la temaro Matematiko, Fiziko, Kemio. Sin helpante per tekstoj, sugestoj kaj notoj de pluraj korespondantoj, li jam redaktis manskribajn malnetojn por kajeroj “Enkonduko en elementan geometrion” kaj “Enkonduko en relativeco-teorion” (kiujn li prezentis kadre de sesio de la Akademio Internacia de la Sciencoj). Li baldaŭ komencos enkomputiligi tiujn tekstojn por mem-eldono, kaj poste ilin sendos al redakta skipo, por veni al definitiva redakto.

Se, kiel espereble, li baldaŭ disponos helpanton, ili povos akceli analogan laboron pri la abundaj notoj manskribitaj por diversaj aliaj kajeroj (Formala logiko, Desegnado de matematikaj kurboj, Plene solvita kemi-problemaro, Diferencialaj ekvacioj oftaj en meznivela fiziko, Elementa statistiko, Prifinanca algebro, kaj pluraj aliaj), tiel ke ili povos prizorgi de 6 ĝis 10 studkajerojn.

(f) La unuaj paŝoj estas jam faritaj por muntado de skipo, kiu sin okupu pri Literaturo. Oni planas jam por la fakoj “Liriko” kaj “Epopo”.

(g) La unuaj priparoloj estas jam faritaj por muntado de skipo, kiu sin okupu pri Juro, kun speciala atento al internaciaj aferoj (UNO, la kreskanta leĝaro de la Eŭropa Komunumo, k.s.).

(h) Muntado de alifakaj skipoj estus tre bonvena por la projekto.

(i) Por ŝparo de tempo kaj mono (ankaŭ de eraroj), ĉiu skipo laboru per propra komputilo por mem-eldono.

– Mediante tiaj kursoj se kontribuye a colmar la brecha en la actual organización de los usuarios del Esperanto, estableciendo un puente entre la ya algo abundante enseñanza del Esperanto en estudios de nivel elemental y medio, y los trabajos que por medio del Esperanto empiezan a florecer en academias, universidades y otras instituciones, así como en empresas, en el turismo, etc.

– El trabajo terminológico es más abundante y más fácilmente realizable precisamente para el nivel preuniversitario.

(b) Acerca de los temas a tratar y de las labores de redacción:

– Los Cursos han de ofrecer en principio programas acerca de temas diversos, de suerte que los alumnos puedan elegir según sus gustos e intereses (matemáticas, física, química, biología, geografía, historia, derecho, filosofía, literatura, esperantología, etc). La oferta inicial, sin embargo, dependerá ante todo de los libros de que hasta entonces se disponga y de otras circunstancias.

– Serán objeto de especial atención y cuidado el enfoque humanístico de todos los temas, el contraste sistemático entre concepciones clásicas y modernas en las ciencias y entre sistemas jurídicos diversos, la concepción y educación mundialistas, etc. Se dispondrá así de una biblioteca básica a nivel preuniversitario y no sólo rigurosa desde el punto de vista técnico, sino también rica en valores éticos y que provea un acceso democrático al saber.

(c) Varias obras del catálogo de diversas instituciones de los usuarios del Esperanto (Asociación Universal de Esperanto, Cursos Universitarios de Verano, Centro Editorial Científico y otros) son ya directamente útiles para el proyecto, y otros precisarán adaptación a su finalidad y nivel. Otros varios se traducirán de otras lenguas. Sin embargo, la mayor parte de los cuadernos de estudio precisos serán redactados directamente para el proyecto. (Es de esperar que si el proyecto llega a arraigar, varias instituciones nacionales e internacionales lo ayudarán con la autorización a traducir y publicar de sus fondos bibliográficos, e incluso eventualmente financiando la edición).

(d) Se proyecta que para cada tema de estudio seleccionado se disponga de un pequeño libro de 50 a 100 páginas. Por tratarse de una edición de ensayo, y además para que los costos sean menores, los textos se presentarán bajo la forma de cuadernos escolares impresos de tamaño DIN A4, con unas grapas al dorso en vez de encuadernación.

Para cada cuaderno de estudio trabajará un equipo internacional de especialistas con un secretario-redactor. Estimamos que se trataría de muy buen éxito si para la primera sesión de los Cursos dispusiésemos de unos 20 cuadernos.

(e) El iniciador del proyecto actúa también como secretario-redactor para el temario de Matemáticas, Física y Química. Basándose en textos, sugerencias y notas de varios corresponsales redactó ya borradores manuscritos para los cuadernos “Introducción a la geometría elemental” e “Introducción a la teoría de la relatividad” y que presentó en ocasión de sesiones de la Academia Internacional de las Ciencias. Pronto comenzará a introducir estos textos en ordenador para autoedición, y luego los remitirá a un equipo redactor para llegar a redacción definitiva.

Si, como se puede esperar, pronto dispondrá de un auxiliar, podrá ambos acelerar el trabajo análogo con las abundantes notas manuscritas para otros varios cuadernos (Lógica formal, Trazado de curvas matemáticas, Colección de problemas de química totalmente resueltos, Ecuaciones diferenciales frecuentes en física de grado medio, Estadística elemental, Álgebra financiera), con lo que podrán atender de 6 a 10 cuadernos.

(f) Se han dado ya los primeros pasos para la constitución de un equipo que se ocupe de Literatura. Hay ya planes para las secciones “Lírica” y “Epopéya”.

(g) Se han mantenido ya las primeras conversaciones para constituir un equipo que trate del Derecho, con especial atención a asuntos internacionales (ONU, la creciente legislación de la Comunidad Europea, etc).

(h) Sería muy bienvenida para el proyecto la constitución de equipos de otras especialidades.

(i) Para ahorro de tiempo y dinero, y para disminución de errores, conviene que cada equipo trabaje con su propio ordenador de autoedición.

(j) Distroj, kunvivado de gelnantoj ĉeestantaj la Kursojn.— Estus tro frue, jam plani nun pri tiaj aferoj. Sed estas plej grave por la projekto, antaŭscii kiel eble plej frue pri studlokoj kaj lernantokvantoj, ĉar adekvataj disponeblaj ejoj ne abundas ĉe edukaj instancoj, kaj des malpli dum la tuj venontaj jaroj; tial, antaŭmendo de ejoj estas jam nun urĝeta afero.

(k) La tuta projekto estas universitata tasko sen profita celo. Tial, la verkistoj fordonas la kopirajton al la projekto mem (kvankam la aŭtonomio ja aperos sur la koncernaj tekstoj kaj la oficiala dokumentaro); kaj analoge por ĉiuj aliaj projekteroj.

Por garantio de korekteco de la financaranĝoj kaj de aliaj aferoj, la tuta projekto restas submetita al la oficiala kontrolsistemo de la Universitato de Santiago de Compostela, kiel ankaŭ al ĉiuj aliaj kontroloj utilaj, necesaj aŭ konvenaj laŭ decido de eventualaj mecenatoj kaj de la starigenda internacia kunordigantaro de la projekto.

(l) Kvankam la projekto naskiĝis en difinita loko, oni devas sisteme klopodi pri ĉiam pli perfekta organizado kaj disdivido de taskoj, kiel ankaŭ pri la eventuala bezono, rearanĝi eĉ ĉiujn projekterojn. Ŝajnas necesa, tamen, ke ekzistu ĝenerala kunordiganto, kaj ankaŭ kunordigantoj por la unuopaj fakoj kaj projekteroj.

La aranĝado restu tial fleksebla, plene aperta al ĉia sugesto kaj propono.

(5)

Pri malvolvo de la Kursoj:

(a) Ĉiu unuopa kajero provizos studmaterialon por unu semajno. En ĉiu nova semajno laŭeble instruos nova profesoro, ankaŭ laŭeble el ĉiujfoje malsama lando.

(b) La profesoroj estos gastigataj de la Kursoj, sed ne salajrataj. Pri vojaĝoj al kaj el la kursejo zorgos ili mem, prefere per subvencio de la propra universitato aŭ de alia institucio (kio principe estas helpe facile atingebla).

(c) La gelnantoj loĝos laŭeble kune en unu sama studenta hejmo, por ke la internacia kunvivado estu grave riĉiga.

Ili devos pagi la librojn, kursokoston, gastigadon, k.s. Aldone al la ebleco, ke la studentoj serĉu mem stipendion, la kunordigantaro de la Kursoj klopodos trovi kiel eble plej ĝeneralan solvon al stipendiado.

(d) Selektado de tekstoj, aŭtoroj, profesoroj kaj gelnantoj; fikrado de kalendaro, decidoj pri eldonkvantoj k.s., okazos per procedo ĉiupaŝe pli perfekta: Komence fare de personoj libervole aliĝintaj, kaj poste per regularo grade starigota de la kurso-kunordigantaro.

(e) Laŭ la plano, la Kursoj principe okazu en Santiago de Compostela. Tamen, nenio malhelpas ke se bezone aŭ utile, ili okazu ankaŭ en pluraj aliaj lokoj en unu sama jaro.

(f) Ni devas objektivite antaŭvidi, ke la unua(j) sesio(j) montriĝos iom neperfekta(j). Tamen, ili probable estos akcepteblaj en si mem, kaj bona bazo por postaj, pli perfektaj evoluŝtupoj.

(6)

Aliaj taskoj en la projekto aŭ rilatigeblaj al ĝi:

(a) La komenca projekto simple antaŭvidis kolektigon en unu saman kursejon de kelkaj 100–150 gelnantoj el diversaj landoj, sendandaj de diversaj instruistoj kunlaborantoj. Poste, pluraj sugestoj venis, ke laŭeble oni interrilatigu la projekton pri la Kursoj kun aliaj laboroj analogaj al ili.

(j) Distracciones, convivencia de los alumnos que participen en los Cursos.— Sería prematuro planificar ya ahora acerca de estos temas. Pero es de la mayor importancia para el proyecto saber lo antes posible de sitios de estudio y del número de alumnos, porque no abundan locales disponibles en las instancias educativas, y menos durante los años inmediatos; por este motivo es asunto de alguna urgencia ya la reserva de locales.

(k) Todo el proyecto es tarea universitaria sin finalidad de lucro. Por ese motivo los autores ceden los derechos de autor al propio proyecto (aunque, naturalmente, sus nombres aparecerán en los textos respectivos y en la documentación oficial); y análogamente para las restantes partes del proyecto.

Para garantía de corrección financiera y en las demás cuestiones, todo el proyecto queda sometido al sistema oficial de control de la Universidad de Santiago de Compostela, así como también a todo otro control útil, conveniente o necesario según decisión de eventuales mecenas y de la coordinadora internacional a establecer para el proyecto.

(l) Aunque el proyecto surgió en determinado lugar, se debe procurar sistemáticamente organización cada vez más perfecta con reparto de tareas, atendiendo a la posibilidad de tener que reestructurar incluso todos los aspectos del proyecto. Sin embargo, parece necesario que exista un coordinador general, así como también coordinadores para cada especialidad y para cada parte del proyecto.

De esta manera la organización se mantendrá flexible y totalmente abierta a toda sugerencia y propuesta.

Acerca del desarrollo de los Cursos:

(a) Cada cuaderno proporcionará material de estudio para una semana. En cada nueva semana explicará en lo posible un nuevo profesor, que también en lo posible será de país distinto cada vez.

(b) Los profesores serán hospedados por los Cursos, pero no percibirán sueldo. De los viajes de ida y vuelta del lugar de los cursos atenderán ellos mismos, preferiblemente mediante subvención de su propia universidad o de otra institución (lo que en principio es ayuda fácilmente alcanzable).

(c) Los alumnos se alojarán en lo posible en una misma residencia estudiantil a fin de que sea enriquecedora la convivencia internacional.

Deberán pagar los libros, importe del curso, hospedaje, etc. Además de la posibilidad de que los propios alumnos se procuren becas, la coordinadora de los Cursos se esforzará en encontrar solución lo más general posible a esta cuestión.

(d) La selección de textos, autores, profesores y alumnos; la fijación del calendario, las decisiones sobre tiradas de libros, etc., tendrán lugar por procedimiento cada vez más perfecto: inicialmente lo harán personas que voluntariamente se incorporen, y luego según reglamento que progresivamente establecerá la coordinadora de los Cursos.

(e) Se proyecta que los Cursos se desarrollen en principio en Santiago de Compostela. Sin embargo, nada impide que de ser necesario o útil tengan lugar también en otros lugares en un mismo año.

(f) Debemos objetivamente prever que la primera o primeras sesiones resulten algo imperfectas. Sin embargo, probablemente serán aceptables en sí mismas, y buena base para fases posteriores más perfectas.

Otras tareas del proyecto o relacionables con él:

(a) El proyecto inicial preveía simplemente la reunión en un mismo local de unos 100 a 150 alumnos de diversos países y que serían enviados por diversos profesores colaboradores. Posteriormente llegaron varias sugerencias de que en lo posible se relacionase el proyecto de los Cursos con otras actividades análogas a ellos.

Du el tiaj parencaj aranĝoj estas la "Someraĵ Universitataj Kursoj en Esperanto" (Universitato de Liège) kaj la kampanjo "Komunikado en la Eŭropa Komunumo" nun malvolvata en la 12 Komunumaj landoj fare de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.

Ĉar kunlaborado inter ĉiuj tiaj aranĝoj povos nur alporti gajnon al ili, tial espereble tia kunlaborado estiĝos. Por ekzemplo, la citita Kampanjo alportus al la Kursoj pli grandan kvanton da studentoj, kaj aliflanke la Kursoj povos proponi al la junularo rektan kaj tujan profiton el Esperanto-studo.

(b) Ju pli ampleksaj estos la ĵus cititaj taskoj kaj kunlaborado, des pli variaj kaj riĉaj povos iĝi diversaj akompanaj provoj: Kontrastiga studo de la ecoj de malsamaj instrulibroĵoj pri Esperanto, ripetado je pli granda skalo de la studoj kaj eksperimentoj pri la relativa facileco kaj propedeŭtika valoro de Esperanto por posta studo de aliaj fremdaj lingvoj, komparaj rezultoj de la ordinaraĵ Esperanto-kursoj kaj tiuj kun "ĉena aranĝo" (t.e., ke la instruistoj de Esperanto komencu la instruadon antaŭ ol ili fakte mastras la lingvon, profitante de la avantaĝoj de la retronuto tiele ŝprucanta), kontrastiga studo pri la investoj bezonataj por ellernado de Esperanto kaj de aliaj lingvoj (mono, tempo, rimedaro, instruistaro, ktp), ebleco de enkonduko de Esperantostudo kaj -aplikoj en la programoj de t.n. pedagogia renovigado, ktp.

(c) Apoge al la ordinaraĵ Esperanto-kursoj, estus utile prezenti aliajn, pli leĝerajn, en la amaskomunikiloj.

Se la projekto trovos adekvatan apogon institucian, oni povos pli facile kaj kun probable de sukceso sin turni tiucele al difinitaj radiostacioj kaj ĵurnaloj.

Plej grava tiurilate estus Esperanto-televizkurso. Antaŭ du jaroj oni komencis kunlabori tiucele en pluraj eŭropaj landoj, kaj Venezuela Esperanto-Asocio traktos dum la Havana Universala Kongreso pri la ebleco munti tian kurson por hispanlingvaj landoj. Ni esperu, ke tiaj planoj realiĝu, danke al ĉies kunlaborado kaj al institucia apogo.

Komplementaj notoj:

(a) La lingvo propra de la projekto (kaj tute speciale, de la studkajeroj kaj instrulecionoj) ja estas Esperanto.

Ni eldonos laŭbezone informilon pri la projektoevoluo. Estus utile kaj deve uzi en la informilo kiom eble plej da lingvoj; tamen, pri tio decidus káj la disponeblaj rimedoj káj la bezonoj de la projekto.

Tiu ĉi numero de la informilo –kaj supozeble ankaŭ la estontaj– havas nenian kopirajton, kaj tial oni rajtas libere traduki el ĝi en aliajn lingvojn. Ni tre dankus alsendon de ekzemplero de ĉiu tia tradukaĵo, kiel ankaŭ de cito en ĵurnaloj k.s.

(b) Pri buĝeto. – Se la Preuniversitataj Kursoj venos iam al maturiĝo, starigo de buĝeto ja estos nepra kaj eĉ leĝe trudata aranĝo.

Sed por la unua kursosesio la situacio estas sufiĉe simpla, ĉar la intertempe ricevitaj subvencioj kaj alitipaj instituciaj helpoj determinos la taskon efektive fareblan –jen tre modestan, jen altnivelan kaj eventuale eĉ gravan.

La ĉefajj buĝeteroj estas: Administraĵ elspezoj de la laborantaj skipoj (informatiko, kompostado, poŝto, sekretariado, kelkaj vojaĝoj), eldonado de 20 studkajeroj, gastigado de profesoroj, komplementaj aranĝoj.

Ĉar ne estas antaŭvideble, ke unu sola institucio aŭ mecenato povos preni sur sin la financadon de la tuta projekto, ĉiuj kunlaborantoj en ĝi klopodos pri atingo de parta financado fare de naciaj aŭ internaciaj institucioj, mecenatoj kaj programoj kun celoj al kiuj estas rilatigebla la projekto pri Internaciaj Preuniversitataj Somerkursoj en Esperanto.

(c) Ĉio pri la projekto estis ĝis nun farita sur privata nivelo; tiu ĉi unua numero de nia informilo konsistigas la oficialan lanĉon de la pro-

Dos de estas actividades análogas son los "Cursos Universitarios de Verano" (Universidad de Lieja) y la campaña "La Comunicación en la Comunidad Europea" que está desarrollando actualmente en los 12 países comunitarios la Liga Internacional de Profesores Esperantistas.

Como la colaboración entre estas actividades sólo utilidad podría aportar a todas ellas, es de esperar que tal colaboración se establecerá. Por ejemplo, la Campaña citada llevaría mayor número de estudiantes a los Cursos, y por otro lado éstos podrían ofrecer a los jóvenes un beneficio directo e inmediato de los estudios de Esperanto.

(b) Cuanto más amplias sean las tareas y colaboración que se acaban de citar, tanto más variados y ricos podrán hacerse diversos ensayos complementarios: Estudio contrastivo de las cualidades de distintos libros de enseñanza del Esperanto, repetición a mayor escala de los estudios y experimentos acerca de la facilidad relativa y del valor propedeŭtico del Esperanto para el estudio posterior de otras lenguas extranjeras, resultados comparativos de los cursos ordinarios de Esperanto y los desarrollados "en cadena" (esto es, que los profesores de Esperanto comiencen a enseñarlo antes de que realmente lo dominen, beneficiándose de la retroalimentación que así surge), estudio contrastivo sobre las inversiones necesarias para el aprendizaje de Esperanto y de otras lenguas (dinero, tiempo, medios, profesorado, etc), posibilidad de introducción del estudio y aplicaciones del Esperanto en los programas de la llamada renovación pedagógica, etc.

(c) Sería útil presentar, en apoyo de los cursos ordinarios de Esperanto, otros más ligeros en los medios de comunicación social.

Si el proyecto alcanza adecuado apoyo institucional, podremos dirigirnos más fácilmente y con probabilidades de éxito con tal finalidad a determinadas estaciones de radio y periódicos.

En este sentido sería de máxima importancia un curso de Esperanto por televisión. Hace dos años se inició colaboración al respecto en varios países europeos, y la Asociación Venezolana de Esperanto tratará en el Congreso Universal de La Habana sobre la posibilidad de montar tal curso para los países de lengua española. Esperemos que estos planes se hagan realidad gracias a la colaboración de todos y al apoyo institucional.

(7)

Notas complementarias:

(a) La lengua propia del proyecto, y ante todo de los cuadernos de estudio y de las lecciones orales, es desde luego el Esperanto.

Según resulte necesario editaremos un boletín informativo sobre la evolución del proyecto. Sería útil y obligado usar el mayor número posible de lenguas en el boletín; sin embargo, en esto decidirán tanto los recursos disponibles como las necesidades del proyecto.

Este número del boletín –y es de suponer que también los futuros– carecen de copyright, y por tanto se puede traducir libremente de él a otras lenguas. Agradeceremos el envío de un ejemplar de tales traducciones, así como de citas en periódicos y casos análogos.

(b) Sobre el presupuesto. – Si los Cursos Preuniversitarios llegan a madurez, será diligencia necesaria y además impuesta por ley la realización de un presupuesto.

Pero para la primera sesión de los Cursos la situación es bastante sencilla, porque las subvenciones y ayudas institucionales de otro tipo entre tanto recibidas determinarán la tarea realmente factible –que puede ser muy modesta, o bien de alto nivel e incluso importante.

Las principales partidas del presupuesto son: Gastos administrativos de los equipos de trabajo (informática, composición, correo, secretaría, algunos viajes), edición de 20 cuadernos de textos, hospedaje de los profesores, actividades complementarias.

Como no es previsible que una sola institución o mecenazgo pudiese atender la financiación del proyecto completo, todos los colaboradores de él procurarán financiación parcial por parte de aquellas instituciones, mecenazgos o programas nacionales o internacionales con los que se puede relacionar el proyecto sobre los Cursos de Verano Preuniversitarios Internacionales en Esperanto.

(c) Todo lo relativo al proyecto fue realizado hasta ahora de manera particular; este primer número de nuestro boletín constituye

jekto, eĉ se nur modestan. La eventualan gravecon la projekto ricevos nur laŭ sia propra evoluo, en kiu ĉiu nova paŝo iĝu bazo por nova kaj iom pli granda apogo fare de la institucioj.

(d) Post fino de la unua Kursoj-sesio estos redaktita oficiala dosiero fare de (kelkaj el) la fakuloj kaj institucioj partoprenintaj, kun informo pri faktoj, rezultoj, proponoj, k.s. Inter la multaj aferoj tie traktendaj troviĝas la jenaj: Taksado pri la valoro, rezultoj kaj utileco de la Kursoj; kalkulo pri kostoj financaj, laboraj, homaj; komparo inter la rezultoj de la diversaj metodoj sekvataj por Esperanto-instruado; propedeŭtika valoro de Esperanto por ellernado de aliaj fremdaj lingvoj, eventuale ankaŭ por helpo al pli perfekta mastrado de la propra lingvo, kaj reciproke; eroj de Esperanto speciale facilaj aŭ malfacilaj por lernantoj de diversaj gepatraj lingvoj; oficialigo de la tuta aranĝaro eduka kaj instrua pri kaj per Esperanto; diplomado por profesoroj kaj lernantaro; konkludoj kaj eventualaj proponoj pri la estonteco de la projekto kaj ebla enkorporigo de ĝi en analogajn taskojn kaj programojn de edukaj kaj ĝeneralaj institucioj naciaj aŭ internaciaj, ktp.

(8)

Institucioj de la uzantaro de Esperanto al kiuj estas sendita tiu ĉi unua numero de la informilo, kaj de kiuj ni petas diskonigi la projekton al siaj membroj kaj publikigi pri ĝi en siaj organoj.

Ni danke ricevos de tiuj kaj alicelaj institucioj, ankaŭ de iliaj membroj aŭ de aliaj personoj, ĉian sugeston, proponon, kunlaboron aŭ helpon por la bona malvolvo de la projekto, tiel en la propra lando aŭ institucio, kiel laŭ ĝenerala vidpunkto.

Ni dankos, por la kazo de oficialaj kaj similaj skribaĵoj, ke la naci-lingvan tekston akompanu traduko en Esperanto. Ni dankos ankaŭ, ke la privatajn leterojn ĝis nun senditajn al ni, oni laŭeble ŝanĝu al oficialaj (de universitatoj, administraj instancoj, kulturaj asocioj, k.s.).

Ni petas, ke ĉiuj tiaj leteroj ne plu estu sendataj al la iniciatinto de la projekto, sed al adreso ĉe la titolo de tiu ĉi informilo.

Estraro kaj anaro de Hispana Esperanto-Federacio (HEF), Madrid, kaj la 50 Esperanto-asocioj kaj -grupoj en Hispanio. (Directiva y socios de la Federación Española y de las 50 sociedades y grupos de Esperanto en España).

Universala Esperanto-Asocio (UEA) (En Konsultaj Rilatoj kun UNESCO). Rotterdam. (Asociación Universal de Esperanto, en Relaciones Consultivas con la UNESCO).

Tutmonda Esperanta Junular-Organizo (TEJO). Rotterdam (Organización Mundial de la Juventud Esperantista).

La 44 Landaj E-Asocioj aliĝintaj al UEA kaj la 29 Landaj Sekcioj de TEJO. (Las 44 Asociaciones Nacionales de Esperanto afiliadas a UEA y las 29 Secciones Nacionales de TEJO).

Akademio de Esperanto. Toulouse. (Academia del Esperanto).

Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS). San Marino, kaj filio en Białystok. (Academia Internacional de las Ciencias y su filial).

Akademio Comenius. København. (Academia Comenius).

Scienca kaj Teknikista Esperanto-Asocio ĉe la Academia Sinica, kaj ties projekto pri Internacia Universitato. Beijing. (Asociación Esperantista Científica y Técnica en la Academia Sinica, y su proyecto de Universidad Internacional).

La 107 universitatoj kaj similnivela instruoj kun E-kursoj, -lektoratoj aŭ -fako (Aix-en-Provence, Paris, Brussel-Bruxelles, Amsterdam, Cambridge, London, Hamburg, Paderborn, Wien, Budapeŝt, Ljubljana, Łódź, București, Sofia, Tartu, Beijing, Changchun, Kōbe, Tōkyō, Seoul, Taegu, Baltimore, San Francisco, Belém, Curitiba, Caracas, Rosario, ktp). (Las 107 universidades y centros de enseñanza de nivel similar que tienen cursos, lectorados o sección de Esperanto).

Internacia Kongresa Universitato ĉe la Universala E-Kongresoj (Universidad Internacional en los Congresos Universales de Esperanto).

Someraj Universitataj Kursoj (SUK). Liège. (Cursos Universitarios de Verano).

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). (Aceptita en kategorio C de UNESCO). San Marino. (Asociación Internacional de Maestros Esperantistas, aceptada en la categoría C de la UNESCO).

Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE). Kiel. (Asociación Científica Esperantista Internacional).

Internacia Asocio de Esperantistoj-Matematikistoj (IAdEM). Paris. (Asociación Internacional de Matemáticos Esperantistas).

Internacia Unuiĝo de Esperantistoj-Filologoj (IUEF). Sofia. (Unión Internacional de Esperantistas-Filólogos).

Esperanta Verkista Asocio (EVA). Budapeŝt. (Asociación de Escritores en Esperanto).

Tutmonda Asocio pri Kibernetiko, Informiko kaj Sistemiko (TAKIS). Utrecht. (Asociación Mundial de Cibernética, Informática y Sistemática).

Komputista Sekcio de ISAE. Budapeŝt. (Sección de Informática de ISAE).

Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA). Tōkyō. (Asociación Esperantista Universal de Medicina).

Asocio por la Enkonduko de Nova Biologia Nomenklatur (NBN). Kalmthout. (Asociación para la Introducción de la Nueva Nomenclatura Biológica).

Internacia Ligo de Agrikulturaj Specialistoj-Esperantistoj (ILASE). Sofia. (Liga Internacional Esperantista de Especialistas Agrícolas).

Terminologia Esperanto-Centro (TEC). Roudnice/Berlin. (Centro Terminológico de Esperanto).

Akademia Centro Interlingvistika (ACI). Warszawa. (Centro Académico Interlingüístico).

Filozofia Asocio Tutmonda (FAT). Florianópolis. (Asociación Mundial de Filosofía).

Tutmonda Esperanta Bibliotekista Asocio (TEBA). London. (Asociación Esperantista Mundial de Bibliotecarios).

Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo (IKEF). Brugge. (Grupo Internacional de Especialistas en Comercio y Economía).

Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj. Eschweiler. (Comité Internacional pro Libertades Étnicas).

Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT). Paris. (Asociación Mundial Anacional).

La aliaj 62 fakaj asocioj aliĝintaj al UEA (blinduloj, ekologiistoj, fervojistoj, poŝto-telegrafo-telefonistoj, diversaj politikoj, sociologio, skoltoj, arto, diversaj religioj, bibliismo, diversaj sportoj kaj ludoj, filatelo, foto-kino-magnetofono-video, handikapuloj, kooperativismo, laboristoj, ministoj, Mensa, muziko, naturismo, ornitologio, radioamatoroj, Rotario, stenografio k.a.). (Las otras 62 asociaciones especializadas afiliadas a UEA).

el lanzamiento oficial aunque modesto del proyecto. Su eventual importancia la irá adquiriendo sólo por su propia evolución, en la que cada nuevo paso sea base para un nuevo y algo mayor apoyo por parte de las instituciones.

(d) Al final de la primera edición de los Cursos será redactado un dossier oficial por (algunos de) los especialistas e instituciones participantes, con un informe acerca de hechos, resultados, propuestas, etc. Entre los muchos asuntos a tratar en él se encuentran los siguientes: Estimación del valor, resultados y utilidad de los Cursos; cálculo de costos financieros, laborales, humanos; comparación entre los resultados de los diversos métodos seguidos en la enseñanza del Esperanto; valor propedeŭtico del Esperanto para el aprendizaje de otras lenguas extranjeras, eventualmente también como ayuda a mejor dominio de la lengua propia y recíprocamente; partes del Esperanto especialmente fáciles o difíciles para alumnos de diversas lenguas maternas; oficialización de todas las actividades educativas y de enseñanza sobre y mediante el Esperanto; diplomatura del profesorado y alumnos; conclusiones y eventuales propuestas sobre el futuro del proyecto y su posible incorporación en tareas y programas análogos de instituciones educativas y generales nacionales o internacionales, etc.

Instituciones de los usuarios del Esperanto a las que se envía este primer número del boletín y a las que rogamos que den a conocer el proyecto entre sus miembros y que traten de él en sus boletines oficiales.

Recibiremos agradecidos de esas y otras instituciones, así como de sus miembros u otras personas, toda sugerencia, propuesta, colaboración o ayuda para el buen desarrollo del proyecto, tanto en el propio país o institución como desde un punto de vista general.

Agradeceremos que en el caso de escritos oficiales y similares acompañe al texto en lengua nacional su traducción al Esperanto, así como que las cartas privadas que nos fueron remitidas hasta ahora se cambien en lo posible por oficiales (de universidades, instancias administrativas, sociedades culturales, etc).

Rogamos que estas cartas no sean enviadas ya al iniciador del proyecto, sino a la dirección que figura en la cabecera de este boletín.

Scienca Eldona Centro (SEC). Budapeŝto. (Centro Editorial Científico).
Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED). Rotterdama. (Centro de Investigación y Documentación sobre el Problema Lingüístico Mundial).
Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Lingvo Internacia (CEDLI). La-Chaux-de-Fonds. (Centro de Investigación y Documentación sobre la Lengua Internacional).
Institucio Hodler. Rotterdama. (Institución Hodler).
Eŭropa Esperanto-Centro (EEC). Antverpeno. (Centro Europeo de Esperanto).
Eŭropa Esperanto-Unio (EEU). Dublino. (Unión Europea de Esperanto).
Eŭropa Klubo. Paderborn. (Club Europeo).
Internacia Esperanto-Instituto. Den Haag. (Instituto Internacional de Esperanto).
Japana Esperanto-Instituto (JEL). Tōkyō. (Instituto Japonés de Esperanto).
Internacia Asocio "Monda Turismo" (MT). Bruselo-Bruxelas. (Asociación Internacional "Turismo Mundial").
Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio. Cittadella. (Asociación Esperantista Mundial de Periodistas).
Diversaj Esperanto-eldonejoj kaj -revuoj (Literatura Foiro, Milano; Heroldo de Esperanto, Torino; Monato, internacia magazino sendependa, Antverpeno/Augsburgo; Grafika Centro Antverpeno, Antverpeno, k.a.). (Diversas editoriales y revistas en Esperanto: Feria Literaria, Heraldo del Esperanto, "El mes" (revista internacional independiente), Centro Gráfico de Amberes, etc).
Radiostacioj kun programoj en Esperanto (Warszawa, Berno, Vieno, Vaticano, Roma, Zagrebo, Beijingo, Rio de Janeiro, Sorocaba, Parizo, Budapeŝto, Tallino, Córdoba, La Habana, Vilnius, Toulouse). (Emisoras de radio con programas en Esperanto).
Diversaj esperantistaj kulturdomoj (Kastelo Grésillon, Baugé; La Kvinpetalo, Bouresse; La Vojnodo, Hastière; Gastejo Edmond Privat, La-Chaux-de-Fonds; Internacia Esperanto-Kursejo, Sofia, k.a.). (Diversas residencias culturales esperantistas: Castillo Grésillon, El Pentapévalo, El Cruce, Residencia Edmond Privat, Centro Internacional para Cursos de Esperanto, y otros).
Informo-grupoj al parlamentoj, UNO, ktp. (Londono, New Yorko, Bruselo-Bruxelas, Roma, ktp). (Grupos para información a parlamentos, ONU, etc.).
Internacia Esperanto-Muzeo (IEMW). Vieno. (Museo Internacional de Esperanto).
Hispana Esperanto-Muzeo (HEM). Sant Pau d'Ordal. (Museo Español de Esperanto).

Redaktis kaj respondecas:

Redactor responsable:

Antonio Alonso Núñez

Iniciatinto de la projekto.

Gvidanto de la E-Kurso ĉe la Instituto por Lingvoj de la Universitato de Santiago de Compostela. Prezidanto de Hispana E-Federacio. Adjunkto de la Akademio Internacia de la Sciencoj (San Marino).

Licenciulo pri matematiko. Diplomito pri Komerca Fako. Statistikisto.

Iniciador del proyecto.

Instructor del Curso de Esperanto en el Instituto de Idiomas de la Universidad de Santiago de Compostela. Presidente de la Federación Española de Esperanto. Adjunto de la Academia Internacional de las Ciencias (San Marino).

Licenciado en Matemáticas. Profesor Mercantil. Estadístico.

La ortografio de Esperanto estas tute regula: al ĉiu fonemo respondas po unu litero, kaj reciproke.

Ekzistas en ĝi kvin vokaloj *a, e, i, o, u*, kies prononcado estas tia sama, kiel en la lingvoj hispana, vaska, serbo-kroata, ĉeĥa kaj aliaj.

Unusiabaj vortoj estas principe senakcentaj. Ĉiuj plursilabaj vortoj havas akcenton sur la antaŭlasta vokalo.

Se la sonoj *i, u* estas malforta parto de diftongo, ili estas skribataj respektive *j, ŭ*. Tiuj ĉi sonoj ne rolas por la akcento-regulo.

Plejparto el la konsonantoj reprezentas la samajn sonojn, kiel en la Internacia Fonetika Alfabeto.

La ortografía del Esperanto es totalmente regular: a cada fonema le corresponde una letra, y recíprocamente.

Existen en él cinco vocales *a, e, i, o, u*, cuya pronunciación es la misma del castellano, del vasco, servo-croata, checo y otras lenguas.

Las palabras monosilábicas son átonas en principio. Las polisílabas tienen el acento siempre sobre la penúltima vocal.

Si los sonidos *i, u* son parte débil de un diptongo se escriben respectivamente *j, ŭ*. Estos sonidos no se tienen en cuenta para la regla del acento.

La mayor parte de las consonantes representan los mismos sonidos que en el Alfabeto Fonético Internacional.